

1989 januaro

82-a jaro

n-ro 997 (1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)


esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)

sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando

059



Kiel rajdi la ondojn en Eŭropo kaj Azio?

Vi trovos,

sur preskaŭ ĉiu paĝo de ĉi tiu numero inviton al agado. Ĉu povus esti pli bona maniero eniri la novan jaron? Inter tiuj rektaj kaj pli subtilaj alvokoj, serĉu ion kio parolas kvazaŭ intime al vi, kio vekas viajn entuziasmon kaj fidon. Kaj retropensu al la projektita Strategia Plano, aŭ foliumu la Jarlibron, por trovi lokon en la UEA-strukturo per kiu vi povas kunlabori kun alilandanoj por la sama celo. Nur tiel la Asocio povas funkcii – kooperative. Tio validas, ĉu temas pri disvastigo, utiligo, aŭ edukado al tutmonda konscio – kaj ĉiujn tri celojn vi retrovos en la ĉi-sekvaj paĝoj.

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA: DUE... (Humphrey Tonkin)
- 2 Landa agado: Vage tra Azio: inter memoroj, esperoj – kaj timoj (S. Milojević)
Interŝanĝoj: Oomotanoj en Ĉinio (Kiotaro Deguĉi)
- 4 Ekstera agado: Ĉu io moviĝas en Eŭropo? (Mark Fettes)
- 5 Manifestacie pri lingvo-politiko (Alberto Menabene)
- 6 Terminologio/Komerca apliko: Elektronikaj terminaregoj – ĉu nova ŝanco por Esperanto? (Rüdiger Eichholz)
Kial ne ankaŭ en Esperanto? (A. Gofen)
- 7 Institucioj: IEMW: la universala biblioteko de Esperanto (Herbert Mayer)
- 9 80 jaroj de UEA: La heredaĵo de Hector Hodler, Parto 2: Pacismo kaj prudento (Ulrich Lins)
- 12 Junularo: TEJO bezonas UEA, kaj inverse (Jan Koszmaluk)
TEJO-IUS seminario: Utila malgraŭ komunikaj problemoj
- 13 Kalendaro (internaciaj aranĝoj ĝis la fino de marto 1989)
- 14 Reagoj pri la strategio kaj taktiko de UEA: Azio nepre bezonas veran Esperanto-centron (Sabira Stahlberg); Venis tempo por pli scienca agado (Werner Schäd); Eduki, jes, sed ankaŭ laŭe agi (Wolfgang Gunther); Admirinda (Marjorie Boulton); Ĉu nova rolo por la Centra Oficejo? (Marian Dobrzyński); Iranaj sugestoj: UEA en la Tria Mondo (Ĵila Saheb-Zamani); Pri generaciaj problemoj en la Esperanto-movado (Renato Corsetti)
- 16 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 17 Foliume (pripresaĵaj raportetoj)
Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 19 Kongresa komuniko de la 74-a Universala Kongreso en Braĵtono
- 20 Esperanto en radio

La kovrilo

Probal Daŝgupto lastatempe komparis Esperanton al ŝipo, kiu navigas inter la kontinentoj de la naciaj lingvoj kun sia propra komunumo, la ŝipanaro. El aktivula vidpunkto, ni povus paroli prefere pri jaĥto, eta kaj pli ema al ŝiprompo. Blovas fortaj ventoj en Eŭropo kaj Azio. Ĉu ni povos traveli la ŝtormon en Ĉinio, rajdi la unuiĝan uraganon en Eŭropa Komunumo? Dubojn pri ambaŭ vi trovos ĉi-numere. Iusence, niaj problemoj estas tre pozitivaj, ĉar la mondo simple iras pli rapide en la ĝusta direkto ol ni mem. Sed kun ioma malĝojo oni legu la duan parton de la artikolo pri Hodler: Ĉu ni esperantistoj efektive plu avangardas? Se vi, kiel ni, opinias ke jes, endas tion pruvi per agoj.

Bonvolu noti la novan telefaks-numeron de la Centra Oficejo, dekstre.

esperanto

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910); establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). Legata en 105 landoj. Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: + 31 10 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: + 31 10 436 1751.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, esploro kaj dokumentado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, University of Hartford, West Hartford, CT 06117-0395; tel. (203) 243-4417; telefakso: (203) 243-4070; telekso 9102505313.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario (kunordigo de la funkciado de la asociaj organoj): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (landa, regiona, kaj faka agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Estrarano (scienca kaj teknika aplikado de Esperanto): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hungario; tel. (1) 316 423; telekso 225931 megy h.

Estrarano (eksteraj rilatoj): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (kongresoj): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendhal, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47.

DUE...

Ĝuste kiel ni esperis, la jaro 1988 montriĝis jaro de planado – jaro en kiu ni analizis la progreson de UEA kaj de la Esperanto-movado, kaj faris rekomendojn por la estonteco. Nova Strategia Plano estis principe aprobita de la Komitato de UEA kaj transdonita al la membraro (en la oktobra revuo *Esperanto*) por ties reago kaj komentoj. Surbaze de tiuj rekomendoj, la Plano estos modifita kaj pli precize fokusita.

Tiu Plano difinas tri ĉefajn prioritatojn por la komenco de la dua jarcento de Esperanto. Iom taŭge, iliaj komencliteroj formas la vorton *DUE*. Temas pri:

Disvastigo de Esperanto;
Utiligo de Esperanto;
Edukado al tutmonda konscio.

Se oni ne lernos Esperanton, la kulturo kaj socio de Esperanto ne pluvivos. Ni salutu kaj gratulu tiujn, kiuj mem instruas la lingvon, profesie aŭ amatore, aŭ kiuj pretigas lernilojn aŭ organizas kursojn. Ni ne dediĉas sufiĉan atenton al tiuj plej bazaj, plej esencaj laborantoj en nia movado. Ni ankaŭ ne mem dediĉas sufiĉan atenton al propra plibonigo de nia lingvoscio.

En rilata tereno, tiuj, kiuj informadas pri Esperanto al la ekstera publiko ludas preskaŭ egale esencan rolon. Kune kun niaj instruistoj, ili konsistigas la *disvastigantojn* de Esperanto.

La *utiligantoj* de Esperanto estas tiuj, kiuj celas praktike apliki Esperanton – en scienco kaj tekniko, kaj en aliaj sferoj de la homa vivo. Ili estas tiuj, kiuj verkas kaj arte prezentas en Esperanto. Ili estas ankaŭ tiuj, kiuj helpas nin pli bone uzi Esperanton, montrante al ni novajn vojojn al ĝia praktika utiligo aŭ plifortigante niajn organizaĵojn kaj instituciojn.

Sed por kio lerni Esperanton, pro kio utiligi ĝin? Ĉefe temas pri tio, ke ni opinias ke pli vasta utiligo de Esperanto igus la mondon pli kapabla trakti siajn aferojn, pli riĉa spirite, pli tolerema kaj komprenema. Nia tria tasko do – post lernado kaj utiligado – estas uzi ĝin por fariĝi pli bonaj civitanoj de la mondo, kaj por helpi la homaron solvi siajn problemojn pace, harmonie kaj kompreneme.

Disvastigo, Utiligo, Edukado al tutmonda konscio – jen, do, tri principoj, tri ideoj, kiujn ni kiel esperantistoj povus bele apliki en la Nova Jaro 1989. En la dua jarcento, DUE fariĝu nia devizo.

Humphrey Tonkin

Se temas pri edukado al tutmonda konscio, ekplanu nun por la

Semajno de Internacia Amikeco 19-25 februaro 1988

Jen tradicia esperantista festo kiu celas ankaŭ la neesperantistojn. Lokaj grupoj povas aparte uzi la okazon, interalie por la jenaj agadoj:

- presigi kaj disvendi bondezirkartojn kaj afiŝojn, kun la SIA-simbolo, Esperanta teksto, kaj traduko(j) en unu aŭ pliaj naciaj lingvoj.
- aranĝi publikan kunvenon, al kiu oni invitu junularajn kaj aliajn grupojn, la urbestron aŭ alian eminentulon, ktp.
- kunlabori kun lernejoj, preĝejoj, pac- kaj internaciaj grupoj por enplekto de la Semajno en ilian agadon (kun aŭ sen uzo de Esperanto).
- fari peton al la urba aŭ regiona registaro oficiale aŭspicii la Semajnon, eventuale en la kadro de ĝemel-urba rilato aŭ simile.
- aranĝi esperantistan amikecan feston, kie oni sendu salutojn, materialon pri la urbo, kaj similajn aferojn al kluboj en aliaj urboj kaj landoj.
- raporti pri via agado al la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Vage tra Azio: inter memoroj, esperoj – kaj timoj

Mia unua posteno (se tiel nomi ĝin) en la internacia Esperanto-movado estis tiu de instruisto en Nepalo kaj Hinda Unio antaŭ 28 jaroj (1960-61). Tibor Sekelj, kiu forpasis antaŭ kelkaj monatoj, sendis min tien. Li tiam gvidis la UEA-fakon Agado en Proksima Oriento, kaj mi ŝajnis al li sufiĉe aventurema kaj iom serioza por utile vivi en Azio dek kvin monatojn kun UEA-subvencio de 50 tiamaj britaj pundoj por la tuta periodo. Ankaŭ mian vojaĝon pagis UEA. En la postaj jardekoj mi iom ofte superflugis la du landojn de mia junaĝo, sed mi neniam sukcesis reviziti ilin. Post jaroj da revado pri tio, mi fine troviĝis ferie en Hinda Unio kaj Nepalo dum la tri lastaj semajnoj de oktobro 1988. Jen iom da notoj survojaj:

Delhio: Oni pardonu al mi, sed mi ne volis serĉi esperantistojn tie. Mi ja fuĝis de ili, volis iom ripozi ekster la movado kaj iom eĉ for de la lingvo. Amikino kaj mi simple zumis tra Delhio kaj ĉirkaŭaĵo. Ŝi fotis ĉion kaj gapis unuafoje al Azio. Mi iom triste serĉis lokojn, kie mi foje loĝis, piknikis, prelegis, tagmanĝis kun Madeleine Haudebine, tiu eta grandanima francino, kiu tiutempe kaj en la postaj jardeko kaj duono estis Panjo Tereza de la hinda esperantistaro. Mi nun reiris al Kutab Minar, Ruĝa Fortikaĵo, eĉ al Taj Mahal, tiu amo-monumento pli bildkarta ol la bildkartoj pri ĝi. La lando ŝanĝiĝis multe pli ol mi dum la pasintaj 27 jaroj. Aŭ mi simple asertas tion al mi.

Kathmandu: Unuavide mi ne rekonis ĝin. Dum la unuaj du-tri horoj mi ne povis orientiĝi en la urbo, kies ĉiu angulo estis konata al mi en 1961. En la stratoj, kiujn antaŭe estis malfacile trairi pro svarmo de konatoj, nun neniu salutis min. La majesto de la montoj ĉe la horizonto atestis tamen, ke mi venis al la loko de miaj revoj. Sed tiel estis nur en la unuaj horoj. Kiam mi sonorigis ĉe la pordo de la familio kun kiu mi loĝis, en kiu mi membris antaŭ 27 jaroj, ĉio ŝanĝiĝis. La patrino tuj kriis mian nomon kaj larmokule klarigis, ke ŝiaj filoj Bala kaj Shree ĉeestas ian feston. Ŝi parolis nepale, kaj mi kun konsterno ekrimarkis, ke mi ankoraŭ sukcesas kapti la sencon de ŝiaj vortoj.

Poste ĉio ruliĝis kvazaŭ filme: Shree vokis Baikuntha, tiu informis Tirtha Raj, kiu vokis Keŝav Ram, kiu parolis al Ŝanker kaj Bhim, kiuj telefonis al Raja kaj Dev Ratna, mi mem eldetektivis Triratna, Gamvir Man aperis en mia hotelo . . . Kathmandu denove fariĝis mia urbo. Invitoj, ekskursoj, vizitoj, lunĉoj, vespermanĝoj, promenadoj – la du semajnoj forvoriĝis kvazaŭ temus pri du tagoj.

La lastan vesperon mi invitis la retrovitajn geamikojn al akcepto. Venis trideko. Ni parolis en Esperanto kaj pri ĝi. Mi miris, ke post preskaŭ tri jardekoj miaj nepalanoj ankoraŭ kapablas uzi la lingvon, kelkaj tute flue: Baikuntha, Keŝav Ram, Tirtha Raj . . . Ili havis nenian aŭ preskaŭ nenian kontakton kun la movado intertempe. Iuj ankoraŭ trenis en siaj poŝoj tion kio restis de vortaretoj el 1961. Pluraj entuziasmas ne malpli ol antaŭe. Keŝav Ram estas pli “verda” ol mi.

Ni interkonsentis revivigi la iaman movadan kernon en Nepalo. Mi promesis reviziti ilin post du-tri jaroj, jam

sendis al ili iom da libroj, aranĝis membrigon de pluraj en UEA, promesis subtenon al iliaj klopodoj fondi landan organizaĵon. Se vi volas helpi aŭ kontakti, skribu al: s-ro Baikuntha M. Maskey, KA 1/106 Tripureswar, Kathmandu, Nepalo.

Kiam la Estraro de UEA informiĝis, ke mi estos private kaj ferie en tiu mondparto, oni diris ke mi ja plufluigu al Ĉinio, por iom esplori la nunan staton kaj la perspektivojn de la planata pli intensa agado en Azio.

Pekino: Estis ĝuo reveni al Pekino sen la premsonĝoj de kunorganizado de la 71-a Universala Kongreso tie en 1986. En miaj 48 pekinaj horoj, oni tamen sukcesis aranĝi kvar bankedojn tie, sufiĉe por firme postuli de mia prizorganto Dai Song-en, ke mia vojaĝplano tra Ĉinio inkluzivu *maksimume* unu bankedon tage, kion li poste plimalpli skrupule sekvis. Mi estis sesafoje en Pekino dum la lastaj kvar jaroj kaj ne necesis plu orientiĝi, sed nur daŭrigi jam komencitajn interparolojn kaj traktadojn. Radio Pekino, Guoji Shudian, *El Popola Ĉinio* – ĉiuj sentas fortan bezonon doni iom da internacia praktiko al kelkaj el siaj multnombraj kunlaborantoj. Ni interkonsentis, ke UEA trovu manieron akcepti por kelkmonata periodo po unu el la pli junaj laborantoj en tiuj pekinaj fabrikoj de Esperantaj eldonaĵoj kaj programoj.

INTERŜANĜOJ

Oomotanoj en Ĉinio

Oni diras, sojle al la dua jarcento de Esperanto, ke nun estas epoko de disvastigo ekster Eŭropo, speciale en Afriko kaj Azio. Se tio veras, plifortigo de kontakto kaj amikeco inter ekster-eŭropaj esperantistoj kaj organizaĵoj estas grava por la monda Esperanto-movado.

Sesdek oomotanaj esperantistoj faris paŝon tiucele en oktobro 1988 per unusemajna vizito al Ĉinio. La karavanan vojaĝon, kiu celis kulturinterŝanĝon kaj interamikiĝon, organizis la Junulara Fako de Oomoto. La karavano havis du gvidantojn kiuj ekde 1963 jam multfoje vojaĝis: s-ro Kiotaro Deguĉi, prezidanto de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, kaj s-ro Joŝimi Umeda, vicprezidanto de UEA.

La karavano vizitis tri urbojn: Ŝanhajo, Ĉingdao kaj Pekino, kie lokaj esperantistoj kaj aliaj urbanoj bonvenigis la japanajn samideanojn.

En ĉiu urbo okazis kultura interŝanĝo. Alterne, la ĉinoj kaj la japanoj prezentis erojn de siaj respektivaj kulturoj. Japanoj prezentis ŝimajon (no-dancon), noan muzikon per bambufluto kaj tamburo, muzikon de jakumokotoo



Cetere, mi estis gasto de la Ĉina Internacia Turisma Servo dum mia bone organizita kaj agrabla, kvankam iom densa programo en Ĉinio. Ni i.a. diskutis eblecojn organizi regulajn grupvojaĝojn de eksterlandaj esperantistoj al Ĉinio. Devus ekzisti iom da intereso por tia entrepreno, el kiu profitus ankaŭ la ĉina Esperanto-movado.

Ĉingdaŭ: Nova, vigla E-movado tie jam sukcesis produkti televidan E-kurson, kiu baldaŭ komencos elsendiĝi unue regione, poste tutlande en Ĉinio. Ankaŭ aparte bela urbo, kun iom da eŭropa influo almenaŭ arkitekture, kun agrabla klimato kaj prospera ekonomio. La movado tie ĝuas tre fortan subtenon de la lokaj aŭtoritatoj, iom ĝenerala trajto de la ĉina E-movado diference de aliaj, precipe de okcidentaj landoj. Ĉingdaŭ invitis la venontan Pacifikan E-Kongreson en 1992, fondiĝas turisma E-fako, okazas kursoj en la nova universitato tie, kaj . . . oni atendas miraklojn de la internacia E-movado.

Ŝanhajo: Tiu urbego klopodas regajni sian iaman reputacion de mondurbo. Ĝi estis lulilo de la ĉina E-movado kaj ankaŭ nun havas vastan kaj fortan movadan bazon. Krom la aktiva Ŝanhaja E-Asocio (kun oficejo kaj pagata sekretario), funkcias en la Ŝanhaja Universitato por Internaciaj Studoj aparta tutjara kurso por E-instruistoj. Ankaŭ nun studas tie dudeko da ĝejunuloj, kiuj poste instruos Esperanton en diversaj universitatoj tra la lando. Surprizo por mi estis vizito al la Orient-Ĉina Normala Universitato kaj ties studenta E-Asocio kun 250 membroj. Gestudentoj tie viglas, eldonas proprajn instrumaterialon kaj bultenon, kaj parolas la lingvon pli kuraĝe kaj sekve ankaŭ pli bone ol ĝenerale en Ĉinio. Tial Ŝanhajo restas unu el la plej seriozaj kandidatoj rilate

niajn planojn intensigi la agadon por Esperanto en Azio. Kiel la unua tia iniciato, la kurson por E-instruistoj eble jam en la venonta jaro partoprenos kelkaj studentoj el aliaj aziaj landoj per subvencio de UEA.

Kantono: Tiu malnova grandhaveno surprizis ne nur min sed ankaŭ mian ĉinan akompananton: 7 000 partoprenantoj en koresponda kurso, 2 000 personoj lernantaj pere de loka radio-kurso, propraj oficejoj, instrumaterialo, gazeto . . . Ankaŭ Ĉina E-Ligo en Pekino ne sciis pri ĉio ĉi. Forta subteno de la lokaj aŭtoritatoj, multaj espero pri Esperanto. Amaso da floroj ĉie tra la urbo, ĉe privataj same kiel ĉe oficejaj fenestroj.

Ŝenĝen: Vi ne trovos tiun urbon sur iom pli malnovaj mapoj: ĝi aĝas kvin jarojn kaj jam havas preskaŭ milionon da loĝantoj kaj provizoraj laborantoj. Ĝi estas kvazaŭ la alia parto de Honkongo, kun kiu ĝi limas. Ŝenĝen volas venontjare kunvenigi la movadajn komercistojn kaj ekonomikistojn. Ĝi volus apliki Esperanton, utiligi ĝin. Multaj homoj lernis la lingvon tie, eĉ komprenas ĝin, sed paroli estas malfacile, ĉar oni neniam faris, ne havis ŝancon.

Estas timige konstati kiom multaj homoj lernas Esperanton en Ĉinio. Ili estas pli multaj ol ni en la internacia E-movado konscias, pli multaj ol eĉ Ĉina E-Ligo sukcesas statistiki kaj gvidi. Ili ĉiuj havas siajn atendojn kaj agemon, al kiuj maladekvatas la ebloj kaj ofta inerteeco de la cetera E-movado. Ĉu ni en Ĉinio havas pli da ŝancoj ol ni kapablas utiligi?

S. Milojević
Ĝenerala Direktoro de UEA



Kiotaro Deguĉi salutas la kunvenon en Pekino.

(dukorda tradicia muzikilo), popoldanco "Mirokudanco", kantojn, uta-ĉantadon, kaj lumbildojn pri Japanio kaj la esperantista seminario de la Oomoto-Lernejo de Japanaj Tradiciaj Artoj.

La ĉinoj prezentis, en Ŝanhajo, belajn kantojn ĉinajn, japanajn kaj Esperantajn, ĉinan batalarton "taj ĝi ĉŭan", kaj mirigan arton detondi siluetojn. En Ĉingdao, ge-

knaboj kaj iliaj instruistoj prezentis ĉinajn kantojn kaj tradician ĉinan muzikon per zimbalo kaj per "bivoj", ĉinaj kotooj (kordinstrumentoj) novstilaj kaj malnovstilaj. En Pekino oni prezentis eŭropstilan muzikon (denove per bivoj), pupteatron iam premiitan en la Pupteatra Internacia Festivalo en Jugoslavio, kaj esoteran kuracmetodon uzantan, interalie, energion de manplato.

La interŝanĝo de tradiciaj artoj kaj kulturoj servis kiel rimedo por pli profunda interamikiĝo. Tiaj klopodoj estas aparte gravaj inter popoloj kiuj ankoraŭ memoras la kruelaĵojn interpopolajn de la dua mondmilito.

Post la vojaĝo s-ro Cutomu Niŝio, prezidanto de la karavano kaj estro de la Junulara Fako de Oomoto, diris: "Kun tiuj ĉi valoraj spertoj ni volas pozitive organizi similajn kulturajn kunvenojn ne nur kun ĉinaj samideanoj, sed ankaŭ kun koreaj kaj alilandaj samideanoj por tiel kontribui al la mondo-paco."

Kiotaro Deguĉi

SALUTE, NE DRONE



Foje oni ŝajnas kredi, ke ni en la CO dronas sub niaj labor-ondoj. Tamen foje nia gesto mansvinga estas simpla saluto, kaj tia ĝi estas nun. Ni krome novjare rezolucias, ke vi estu kontentaj pri niaj servoj en 1989 – kaj aldonas ĝojan anoncon pri la Zamenhof-taga geedziĝo de niaj ĉiamaj kunlaborantoj Rob Moerbeek kaj Nora Reinders. Feliĉon al ili!

Ĉu io moviĝas en Eŭropo?

Ĉiuj jam scias: En 1992 forfalos la limoj inter la dek du ŝtatoj de la Eŭropa Komunumo. Dum la tri jaroj inter nun kaj tiam, la Eŭropa Parlamento intense okupiĝos pri la leĝaj kaj aliaj necesaj ŝanĝoj, kiuj ebligas pli-malpli senbaran fluon de homoj kaj materialoj en kio fariĝos la plej granda ekonomia unuo en la mondo.

Kaj kio pri la lingva problemo? Fundamenta principo de la Komunumo estas la egalrajteco de ĉiuj oficialaj lingvoj de ĝiaj membraj ŝtatoj – nun la angla, dana, franca, germana, greka, hispana, itala, nederlanda kaj portugala. Tio kondukas kompreneble al grandaj elspezoj ĉe la Parlamento kaj konsiderindaj ĝenoj en la interŝtata komunikado, sed tiuj ĝenoj montriĝis ĝis nun tolereblaj. Brian Moon foje taksis, ke 0,6% de la tuta Komunuma buĝeto iras al tradukado kaj interpretado, kio ne en si mem sufiĉas por fari ĝin centra politika demando.¹ Kunrolas ankaŭ la fakto, ke reprezentantoj de la ŝtatoj kun malpli parolataj lingvoj preskaŭ ĉiam regas unu aŭ pli el la angla, franca kaj germana, kiuj en la koridoro praktiko rolas kiel laborlingvoj. Tiun kaŝitan *malegalecon* oni akceptas, pro la kutimo de jarcentoj kaj pro diversa rezisto kontraŭ konsidero de Esperanto.

Tamen la unuiĝo de 1992 instigis la Komunumon pli atenti la lingvan problemon. Venis lastatempe diversaj alvokoj por pli vasta kaj efika instruado de fremdaj lingvoj en la membraj ŝtatoj, kune kun maltrankviligaj raportoj pri la efektiva sukceso de la nuna instruado. La hispana registaro, kiam ĝi dum ses monatoj de 1989 prezidos la Komunumon, intencas doni prioritaton al tiu demando. Sur tiun plugopretan terenon paŝas nun la okcident-eŭropaj esperantistoj.

Andrea Chiti-Batelli, iama membro de la itala delegacio ĉe la Eŭropa Parlamento, jam de kelka tempo pledas publike por rekonsidero pri la instruado de Esperanto.² En septembro ĉi-jare aperis lia alvoko “Por politika iniciato de la esperantistoj ĉe la Eŭropa Komunaĵo”. En ĝi li nomas mito la celon de plurlingveco por ĉiuj; sed li akceptas ke tiu mito tiel forte radikiĝis en la eŭropa politiko, ke havas pli da senco ekspluati ol kontraŭbatali ĝin. Li do proponas ke oni enkonduku Esperanton kiel preparan lingvon, tial ke “pluraj, profundaj kaj samrezultaj esploroj, efektivigitaj en pluraj lokoj, kaj precipe ĉe la Instituto de Lingva Kibernetiko de la Universitato de Paderborn, ŝajnas pruvi, en unusenca kaj nekontestebla maniero, ke la instruado dum du jaroj de la internacia lingvo Esperanto . . . plifaciligas la ellernadon de la vivantaj [tiel] lingvoj.” La Esperanto-movado do celu tiusencan rezolucion de la Eŭropa Parlamento. Itala Esperanto-Federacio jam donis sian subtenon al tiu ideo.

Alian kaj pli vastan kampanjon proponas **Hans Erasmus**, nederlanda specialisto pri mediprotekta politiko.

“En la EK Esperanto estas parolata kaj legata en ĉiuj membroŝtatoj, sed . . . antaŭjuĝoj kaj nescio kreis grandan distancon inter la . . . Esperanto-movado unuflanke kaj politikistoj, instruspecialistoj kaj la publiko aliflanke.”

– Hans Erasmus

Lia “Projekto de komunikado en la Eŭropa Komuno” (oktobro 1988) tamen same celas meti Esperanton en la vastigitan programon de okcidenteŭropa lingvo-instruado. Inter la paŝoj proponitaj de Erasmus estas la jenaj:

1. Starigi esperantistan laborgrupon kun reprezentantoj el ĉiu lando de EK, kiuj tenu kontaktojn kun la landaj asocioj kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj (unua kunveno en marto-aprilo 1989).

2. Tiu grupo kunordigu kampanjon kiu kulminu en samtempa televidelsendo en ĉiuj EK-landoj en aŭtuno 1991, pri la temo: Ĉu ekzistas en EK komunikada aŭ lingva problemo, kaj se jes, kiun rolon ludu Esperanto en ties solvo, apud aliaj eblaj solvoj. La elsendo enplektu politikistojn, lingvistojn kaj ordinarulojn.

3. Same kiel proponas Chiti-Batelli, oni klopodu akiri oficialan subtenon por konvink-skala eksperimento pri instruado de Esperanto apud aliaj lingvoj en la edukaj

sistemoj de la dek du ŝtatoj. La rezultojn, inkluzive de partopreno de kelkaj lernintoj, oni metu en la televid-elsendon.

4. Celata rezulto estu, ke EK financu la televidan instruadon de Esperanto dum plurjara provperiodo.

La projekto de Erasmus jam logis la apogon kaj kunlaboron de Edward Symoens, prezidanto de ILEI; necesos tamen multe pli vasta reto de aktivuloj. Similan reton volas krei **Albert Menabene**, sekretario de “Esperanto” Radikala Asocio (vd. *Esperanto* 1988/p. 127 kaj la apudan raporton). “La starigo de ERA-sekcio aŭ, almenaŭ, de ERA-representanto ŝajnas oportuna por faciligi ĉie la kunordigon de ĉiu komuna iniciato por levi en Eŭropo kaj en la cetera mondo la lingvan problemon,” li deklaras, emfazante ke “ERA konsistas el radikaluloj absolute sendependaj rilate al la ĝenerala agado de la (itala) Radikala Partio.” La unua celo de ERA estas atingi, ke la naciaj televid-stacioj aranĝu kaj elsendu debatojn pri la lingva problemo de la EK. “Poste devas sekvi iniciatoj al la parlamentanoj kaj al la partioj por . . . oficialigo de Esperanto enlande . . . kaj eksterlande.”

Laŭdinda ĉe ERA estas tio, ke ĝi jam ekzistas kaj aktivas, eĉ se malgrandskale. Ĉe ĉiu iniciato pri EK (aŭ iu ajn alia grupo de ŝtatoj), la problemo de internacia organizado okupas centran lokon – kaj tiun problemon la esperantistoj ankoraŭ tute ne solvis. Ĉu ne absurde kaj paradokse?! La provo je vera eŭropa Esperanto-centro en Bruselo paneis antaŭ unu-du jaroj, neniam ĝuinte vastan subtenon de la landaj asocioj. UEA okupiĝis pli intense lastatempe pri la movado en aliaj mondopartoj. Sed la bezono nur kreskas, kiel montras la diverseco de la ĉi-artikolaj proponoj. Jen la vidpunkto de hungara spektanto **István Nagy**:

Ni ne forgesu, ke la EK-n ne entuziasmaj eŭropanoj estigis, sed kompetentaj instancoj, registaroj. . . . En Eŭropo komenciĝis, eĉ se nur en ĝermoj, la ekonomia kaj politika kunlaboro kies bazo estas la Fina Akto de Helsinki. Por subskribi similan Finan Akton de Esperanto fare de la eŭropaj asocioj, necesas unue la kunlaboro de la dek du asocioj de EK kiel bazo por la posta kunlaboro de la eŭropaj esperantistoj (asocioj). Ĉi-lastan mi plurfoje proponis (*Hungara vivo* 2/86, *Monato* 5/88), sed mi devis konvinkiĝi, ke la eŭropa esperantistaro ankoraŭ ne maturiĝis por realigi tian komunumon.

Iom da statistiko. En Eŭropo troviĝas 83% de la individuaj kaj aligitaj membroj (IM kaj AM) de UEA. . . . Eŭropo estas la plej malgranda, plej multlanda, plej multlingva kaj plej esperantista kontinento. 65% de la IM kaj AM vivas en la socialismaj kaj 35% en la aliaj eŭropaj landoj.

Kiel mi nun imagas la farendaĵojn? La bazo estu la du rezolucioj de Unesko en Montevideo kaj Sofio. Tiujn rezoluciojn akceptis ankaŭ la dek du EK-ŝtatoj, do konsentante pri ties konstatoj pri Esperanto. Esperanto-Forumo (el delegitoj de la EK-landaj asocioj) ellaboru rezolucion por diskuto en la Eŭropa Parlamento. . . . Post certa tempo, la asocioj de EK-ŝtatoj kaj la asocioj de la aliaj eŭropaj ŝtatoj ellaboru rezolucion por la ŝtatoj subskribintaj la Finan Akton de Helsinki. . . .

Mi scias, ke – kiel ĉiam, ankaŭ nun – leviĝos la kliŝa demando: Kiu aŭ kiuj realigos ĉion ĉi? Respondo: “Aŭ la esperantistoj aŭ neniu.”

Al vi, do, la 25% de niaj legantoj kiuj loĝas en la EK-landoj, iras la iniciativo. Se iu el la ĉi-supraj vizioj logas vin, skribu tuj al la proponinto, eĉ al pluraj; varbu kunagantojn el via landa movado kaj el via alilanda amikaro. Restas nur tri jaroj ĝis 1992, pasis la tempo por hezitoj kaj prokrastoj. Formetu ĉi tiun revuon kaj ekagu!

Mark Fettes

¹Brian Moon, “Multilingualism in the European Community” (Multlingvismo en la Eŭropa Komunumo), en *Plurilinguisme et communication*, red. F. Lo Jacomo, Parizo, SELAF 1986, p. 191-202.

²Andrea Chiti-Batelli, *L'insegnamento delle lingue nella Comunità Europea: stato attuale e prospettive future* (La instruado de la lingvoj en la Eŭropa Komunumo: nuna stato kaj estontaj perspektivoj), Romo, Armando 1988; *Communication internationale et avenir des langues et des parlers en Europe* (Internacia komunikado kaj la estonteco de la lingvoj kaj dialektoj en Eŭropo), Nico, Presses d'Europe 1987.

Adresoj de kontaktuloj por la menciitaj projektoj:

- Umberto Broccatelli (komisiito de Itala Esperanto-Federacio pri eŭropaj aferoj), Via Brodolini 10, I-00139 Roma, Italio (pri la projekto de Chiti-Batelli)
- Hans Erasmus, p/a UEA aŭ Edward Symoens (adresoj ĉe la interna frontkovrilo)
- Alberto Menabene, via Monti Sibillini 3, I-00141 Roma, Italio

Manifestacie pri lingvo-politiko



Kiel anoncite, sabaton la 8-an de oktobro efektiviĝis en Romo la 2-a manifestacio de “Esperanto” Radikala Asocio (ERA) antaŭ la sidejo de la nacia televido RAI por atingi debatojn pri la eŭropa (kaj internacia) lingva problemo. En la unua manifestacio (la 28-an de marto) partoprenis 13 homoj; ĉi-foje, ankaŭ pro la oficiala ĉeesto de katolikaj geesperantistoj, la nombro de la partoprenantoj estis preskaŭ duobla. Oni devas aldoni, ke kelkajn tagojn antaŭe ERA organizis en la centra placo de la urbo, “Largo Argentina”, disdonadon de flugfolioj, al kio sekvis disdonado de informoj al la gazetaro.

Al ĉio dirita oni ŝuldas la fakton, ke kvar romaj ĵurnaloj (*La Repubblica*, *Il Tempo*, *Il Giornale d'Italia* kaj *Paese Sera*) raportis pri la manifestacio, kaj la oficiala organo de la Itala Socialista Partio (PSI) finfine aperigis pri Esperanto artikolon (kies publikigo estas prokrastita 18 monatojn!). Per tiu artikolo mi demonstras, ke la fondinto de la Itala Komunista Partio, la mondkonata politikisto Antonio Gramsci, kiu en 1918 sin deklaris kontraŭ Esperanto (tiel malfavore influante la sintenon de tiu partio), se ankoraŭ estus vivanta hodiaŭ favorus la adopton de Esperanto kiel oficiala eŭropa lingvo.

Nun ni estas en la vojo atingi la petitajn debatojn ĉe la itala televido; dume, estis surbendigita 15-minuta intervjuo al tri parlamentanoj, dissendita fare de la nacia radio la 15-an de novembro; unu el ili, la tre konata pornostelulino Ilona Staller, deputito de la Radikala Partio, sugestas al la registaroj de la Eŭropa Komunumo oficialigi en sia lando la instruadon de Esperanto (sekvante la ekzemplon de Hungario) kiel unuan paŝon al la oficialigo interŝtata.

Konstatinte la ĝisnunajn bonegajn rezultojn, mi proponas al ĉiuj geesperantistoj plian surstratan manifestacion, **sabaton la 14-an de oktobro 1989**. La alvoko, kompreneble, estas aparte direktata al la civitanoj de la dek du ŝtatoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, inter kiuj estas starigita proceso de politika unuiĝo, kiu tamen ne havas sencon, se al ĝi ne kuniĝas la kreo de “eŭropa popolo”.

Alberto Menabene

Elektronikaj terminaregoj – ĉu nova ŝanco por Esperanto?

La multlingveco de la mondo kaŭzis, ke DLT (Distribuita Lingvo-Traduko) havas bonajn ŝancojn por venki konkurantajn sistemojn de aŭtomata maŝintradukado, ĉar aliajn sistemojn oni preparas por nur po unu lingvo-paro. Ekzistas ankoraŭ alia agad-kampo ebligata de moderna tekniko, sur kiu Esperanto povus venki, se sufiĉe multaj esperantistoj kunlaboros por realigi tiun projekton. Temas pri registrado de amplekseĝaj elektronikaj vortaroj en multaj diversaj lingvo-paroj, inter kiuj – kiel en la DLT-sistemo – ĉiam troviĝu Esperanto.

Optikaj muzikaj diskoj, legataj per lasero, nun jam estas vaste konataj kiel “kompaktaj diskoj”. La kvanto da teksto registrebla sur unu tia disko estas preskaŭ neimagebla: pli ol 500 megabajtoj da teksto. Tio plenigus 200 mil-paĝajn librojn! Kaj tamen la produkto-kosto por unu tia codoroma disko (CD ROM) estas nur US\$2,00, kontraŭ vendo-prezo de pli ol US\$200,00. Eldoni tiuspecajn diskojn tial estos profitdona, eĉ se la diskoj estas vendeblaj nur malgrandkvante. Estas krome antaŭvideble, ke prezoj por diskoj kaj legatoroj (aparatoj por legi codoromajn diskojn) tiom falos, ke ordinara uzantoj kapablos aĉeti ilin.

Nuntempe industriaj gigantoj jam baraktas por atingi pintan pozicion en ĉi tiu nova merkato. Ĉu ni sukcesus konkuri ilin? Mi estas konvinkita ke tio eblos, ĉar inter ni

troviĝas multaj kiuj volonte laborus volontule por la enmerkato de Esperanto. Komercaj entreprenoj ne zorgos pri la malgrandaj lingvoj, ĉar tiuj ne promesas tujan profiton. Kaj se ni finfine pro iu kialo ne sukcesos komerce produkti la diskon, eĉ tiam niaj elektronikaj registraĵoj sur moldiskoj estos utilegaj por ĉiuj niaj praktikantoj. Mi jam skribis detale pri tio en *Akademijaj studoj 1987*.

Mi antaŭvidas jenajn ŝtupojn en la laboro:

1. Ni komencu per la plej facila tasko, la registrado de dulingvaj terminaroj por ĉiuj lingvoj, kiuj jam posedas detalan etnolingvan-Esperantan vortaron. Oni ĉiam indiku la fontverkojn.

2. Al tiuj registraĵoj ni aldonu unu etnolingvon post la alia kiel cellingvojn, uzante la plej detalajn etnolingvaj vortarojn.

3. Ni registru unue la komunlingvajn vortojn kaj ankaŭ kompletajn esprimojn en kiel eble plej multaj diversaj lingvoj. Estos pli praktike fari tiun plej malfacilan laboron komence, kiam la dosieroj ankoraŭ ne tro ŝveliĝis pro aldono de multaj fakaj terminoj.

4. Nur poste ni aldonu sen difinoj la terminojn el fakaj vortaroj.

5. Paralele kun (2-4), esperantistaj specialistoj kreu la mankantajn Esperantajn terminojn.

6. Post ĉio ĉi, ni kunfandu la dosieregojn de po unu fontlingvo kaj cellingvo, kaj ordigu laŭ la Esperantaj terminoj. Certe ni trovos multajn terminojn, kiuj troviĝas nur en unu dosiero kaj ne en la alia, kaj ankaŭ nekongruaĵojn inter etnolingvaj kaj Esperantaj terminoj. Tiel ni havos unikan ŝancon kompari kaj kongruigi niajn Esperantaj vortarojn, eĉ dum ni forigas mankojn el la etnolingvaj registraĵoj.

7. Evidente tiuspeca kontrolo laboro povus okupi multajn homojn por pluraj jaroj. Ni pro tio ne prokrastu la eldonon de la codoroma disko ĝis ĉiuj problemoj estos solvitaj. Plibonigi la registraĵojn estos senfina laboro.

En cirkulero TC 88/3 mi detale priskribis, kiel unuece prepari la registraĵojn. Tiun cirkuleron mi pretas sendi al ĉiu, kiu interesiĝas pri tiu laboro (se eble sendu du respondkuponon). Bonvolu indiki, kiom da paĝoj el kiu vortaro vi povus registri. Necesas ia mikrokomputoro: feliĉe mi povas legi per miaj aparatoj ankaŭ registraĵojn, kiuj estis faritaj per ne-IBM-kongrua komputoro, se la moldiskoj estis antaŭe formatigitaj per IBM-a aparato.

Krom registrantoj estas bezonataj kontrolantoj por kontroli la ĝustecon de la registraĵoj. Ili notu la kritikindaĵojn sur fotokopioj kiujn ili ricevos de mi. Kunlaboremuloj por tiu tasko bonvolu anonci sin.

Se ni sukcesos – kaj mi certas ke tio okazos, se sufiĉe da homoj kunlaboros – tiam ni povos kolekti inter la esperantistoj la necesan kapitalon por fondi komercan kompanion. Ĉu pro tio pli da esperantistoj pretus fari la necesan bazan laboron?

Rüdiger Eichholz
Bailieboro, Ont.
Kanado K0L 1B0

de A. Gofen, Moskvo:

KIAL NE ANKAŬ EN ESPERANTO?

Antaŭ pli ol 50 jaroj E. Lanti starigis la demandon “Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?” en sia brila broŝuro. Kaj nur nun polemiko pri ĉi tiu problemo aperis en Sovetio mem. El la multaj sovetiaj periodaĵoj, aparte progresemaj laŭ spektro de temoj kaj objektiveco estas la plurlingvaj revuoj *Moskvaj novaĵoj* kaj *La 20-a jarcento kaj la paco*. Tiuj ĉi periodaĵoj troviĝas en la avangardo de “glasnostj” (malprisilento) kaj “perestrojka” (restrukturigo). Problemoj kaj teruraĵoj de la 70-jara socia eksperimento sur “viva materialo” en la grandega lando, la milito, masakroj, persekutoj, armeo kaj pacpolitiko, koruptado kaj demoralizo, nun estas finfine libere diskutataj.

Tiuj ĉi revuoj, kvankam plurlingvaj, ankoraŭ ne aperas en Esperanto. Mi alvokas ĉiujn esperantistojn de la mondo skribi nacilingve al la redaktoroj kun peto aperigi la revuon ankaŭ en Esperanto. La adreso estas:

S-ro E. Jakovlev


ĉefredaktoro de *Moskvaj novaĵoj*

str. Gorkij 16/2, SU-103829 Moskva, Sovetunio;

S-ro A. Beljaev

ĉefredaktoro de *La 20-a jarcento kaj la paco*

str. Gorkij 16/2, SU-103829 Moskva, Sovetunio.



INSTITUCIOJ

IEMW: la universala biblioteko de Esperanto

En la centro de Vieno (Aŭstrio), en la iama privata arkivejo de la lasta Aŭstro-Hungara Imperiestro, meze de la tiel nomata Hofburg, rezidas unu el la plej tradicihavaj Esperanto-institucioj: La Internacia Esperanto-Muzeo en Wien/Vieno (IEMW). Trankvile kaj konstante ĝi laboras ekde 1927, same trankvile kaj konstante subtenata de multaj Esperanto-parolantoj dise en la mondo.

La nomo “muzeo” iom misgvidas: pli ĝuste dirite, IEMW estas la plej ampleksa *fakbiblioteko* pri Esperanto kaj pri aliaj planlingvoj; ĝi formas kolektaĵon interne de la fama multcentjara Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu disponigas al ĝi la postenojn por du bibliotekistoj plentempe laborantaj.

IEMW dankas sian ekziston al iniciato de Hugo Steiner (1878-1969), kiu ĝin fondis en 1927 laŭ ideo de Felix Zamenhof. Jam en 1929 la Aŭstria Nacia Biblioteko transprenis la kolektaĵon kiel integran parton kaj garantiis laŭkontrakte la pluan prizorgadon de la konstante kreskanta libraro kaj de la ekspoziciaj objektoj. En 1939, post la okupo de Aŭstrio flanke de la nazia armeo, oni fermis la muzeon, sed la fakto, ke ĝi estis en ŝtata posedo, malhelpis detruadon de la materialo. Post solena reinaŭguro en 1947 IEMW ekloĝis sub la kupolo de Mikaelo en la Hofburg (Imperiestra Kortega Kastelo), kie ĝi daŭrigas sian dokumentadan, kolektaĵan kaj informan laboron ĝis hodiaŭ.

La rolo de naciaj bibliotekoj

Preskaŭ ĉiu etna lingvo-komunumo havas siajn bibliotekojn, kie kolektiĝas *ĉio* aperinta en la koncerna lingvo. Tiajn instituciojn oni nomas naciaj bibliotekoj – kaj ili fakte plenumas gravegan rolon. Ili formas kvazaŭ la komunan memoron de la unuopaj nacioj kaj estas instrumentoj por socia, kultura kaj scienca progreso. Tion konscias la registaroj, respektive etnoj, investante gigantajn mon-sumojn por la kreo kaj viv-tenado de tiaj bibliotekoj.

La Esperanto-parola komunumo pro sia diasporeco eĉ en pli alta grado bezonas tian stokejon kaj spiritan trezorejon, kiu savu nian kulturan heredaĵon. Esperanto ne havas “nacian bibliotekon”, sed ĝi posedas la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno, kiu estas la plej granda funkcia Esperanto-biblioteko de la mondo. Multaj homoj utiligas ĝiajn servojn, konsultante la vere unikan materialon. Tiel IEMW fariĝis la centro por esplor-laboroj, kiuj rezultigis jam plurajn doktoriĝajn tezojn, esperantologiajn kaj interlingvistikajn verkojn. Fakte, sur multaj esplor-terenoj serioza interlingvisto ne povas verki sen la servoj de IEMW.

Funkcia biblioteko

Ofte jam spertiĝis la jeno: Privatulo kolekte ekagas, fondas bibliotekon, kunigas kelkajn milojn da libroj –

tiel kreante kernon de valora kultura instrumento. Sed post la morto de la iniciatintoj plejofte estas neniuj, kiu povus pluflegi la heredaĵon. Ĝi aŭ dissplitiĝas aŭ fariĝas posedaĵo de Esperanto-asocioj, kiuj havas nek la monon, nek la tempon, nek la laborfortojn garantii konvenan kreskon, katalogadon, disponigon, utiligon kaj konservadon de la materialo. Ankaŭ la spaca problemo ofte ne-solveblas. Viva, funkcia biblioteko devas *daŭre* plenumi jenajn taskojn:

- 1) konstante pliampleksigi la kolektendan materialon,
- 2) katalogi ĝin laŭalfabete kaj laŭteme,
- 3) konvene stoki kaj protekti ĝin kontraŭ perdoj,
- 4) disponigi ĝin al interesata publiko,
- 5) respondi dokumentadajn informpetojn,
- 6) malhelpi pereon de kaduka materialo per konservado,
- 7) fari esploran kaj publikigan laboron.

Kaj ĉiujn ĉi taskojn IEMW grand-dimensie plenumas.

Kio restos de ni?

Per la invento de la rotacia presilo en la lasta jarcento, la libroproduktado ricevis fortan antaŭen-puŝon. Presado fariĝis malmultekosta kaj rapidega. Baldaŭ oni frontis problemon: la disponebla papero ne sufiĉis. Necesis do trovi novajn procedojn pli efikajn en la paperproduktado. Oni sukcesis – tamen riskante malavantaĝon, kiun en ĝia tuta amplekso oni konas nur hodiaŭ: Ekde proksimume 1850 produktiĝis papero fi-kvalita, enhavanta tro da acido kaj tro da ligneca substanco. Tiu papero jam post cent jaroj komencas malstabiligi kaj ekas procedo de lanta, tamen konstanta disfalo. Kaj imagu: En la bibliotekoj de la mondo tiel kadukiĝas kaj ruiniĝas en la paso de kelkaj jardekoj milionoj kaj milionoj da libroj. *Kaj preskaŭ nia tuta Esperanta literaturo estas presita sur tiu disfalema papero.* Eĉ la Unua Libro.


La savo

En la lastaj jaroj oni evoluigis metodojn konservajn, kiuj povus agi kontraŭ la kadukiĝo de la papero. Tio kondukis al partaj sukcesoj, sed la entreprenendaj dispozicioj estas multekostaj, temporabaj, kaj dependas de granda aparataro. Konsiderante la rimedojn en Esperantio, ni devas konstati, ke preskaŭ neniuj privatulo aŭ asocia biblioteko disponas pri la rimedoj necesaj por kontraŭbatali la plej drastajn perdojn.

Sed jes la Internacia Esperanto-Muzeo, kiu – kiel parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko – povas kunlabori kun ties konservista instituto. Tio signifas, ke IEMW sukcesos protekti siajn trezorojn.

Publikaj rilatoj

Apud tiuj temporabaj bibliotekaj laboroj, kiuj kompreneble ankaŭ inkluzivas la dokumentadan prizorgadon de esplorantoj, IEMW agas al ekstero. Kiel muzeo ĝi estas ĉiujare vizitata de kelkaj miloj da turistoj, grandparte ne-esperantistoj, kiuj volas bazajn informojn pri Esperanto kaj ties utileco. Do, pacience la deĵorantoj klarigas, respondas demandojn, senfundigas antaŭjuĝojn... kaj tio en pluraj lingvoj. Volonte ili informas ankaŭ pri la diversaj landaj asocioj, tiel metante interesatojn en kontakto kun la Esperanto-movado.



La juna direktoro de IEMW, Herbert Mayer

Alvoko al aŭtoroj kaj eldonejoj

La Aŭstria Nacia Biblioteko disponigas du bibliotekistajn postenojn al IEMW. Tio jam estas multe, kaj permesas kontinuan, seninterrompan laboradon. Aliflanke la buĝeto estas hontinde malgranda – ĝi nur kovras la necesajn kostojn de bindado, sed preskaŭ *ne* permesas pligrandigon de la havaĵo per aĉetado. Tial IEMW tute dependas de donacoj, t.e. de la bonvolo de la esperantistoj. *Urĝa peto al la aŭtoroj kaj la eldonejoj:* Bonvolu ĉiam sendi donace unu ekzempleron de viaj eldonaĵoj al IEMW, tiel garantiant, ke ĝi restu ankaŭ en la estonteco la universala biblioteko de Esperanto.

Kiel rekompenco la koncernaj eldonaĵoj menciigis en la kuranta bibliografio de IEMW, kiu estas legata de miloj da kulture interesitaj homoj. Poste la titoloj aperos en la kreota libroforma katalogo kaj plena interlingvistica bibliografio, por kiu jam ekis la unuaj preparaj laboroj. Ĝuste en la preparo de la bibliografio, IEMW estas en kontakto kun CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro de la Lingvo Internacia, La Chaux-de-Fonds, Svisio).

Je via dispono

IEMW estas *via* biblioteko, ĝiaj servoj estas je *via* dispono:

- 1) Vi povas veni kaj studi surloke.
- 2) Vi povas peti telefone aŭ skribe informojn pri la havaĵo de IEMW. (Tamen al turistaj aŭ similaj demandoj kaj petoj ni tute ne respondas. Ĉi-koncerne bv. turni vin al la Vienaj Esperanto-asocioj.)
- 3) Vi povas en Eŭropo pruntepreni librojn, sed nur tra *vialandaj* universitataj aŭ naciaj bibliotekoj, kiuj kunlaboras kun la teleprunta reto internacia. Raraĵoj kaj unikaĵoj devas kompreneble resti surloke por eviti perdon de ne-anstataŭebla materialo.
- 4) Kontraŭ pago vi ricevas fotokopiojn aŭ filmojn de la multobligita centro de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Por viaj interlingvistikaj aŭ esperantologiaj laboroj dokumentiĝu pere de IEMW. En la biblioteka materialo vi verŝajne trovos multon, kiu povos helpi vin.

Helpu!

Por ke IEMW povu plue ludi sian fruktodonan rolon de universala Esperanto-biblioteko, ĝi bezonas *vian* helpon. Kiel vi povas helpi? Jen kelkaj sugestoj:

1) Sendu ĉion, kio koncernas Esperanton aŭ aliajn planlingvojn al IEMW.

2) Fariĝu membro de la asocio de la amikoj de IEMW (kotizo: 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro). Vi ricevos kvarfoje en la jaro – laŭ aspekto modestan – informilon, kiu raportas pri la evoluo de IEMW kaj pri ties publikigaj laboroj. Multfoje jam ĝi aperigis tute nekonatajn, sed decidajn tekstojn pri Esperanto, ties historio kaj kulturo.

3) Sendu *nacilingvan* informmaterialon, kiun oni povas doni al vizitantoj el via lando. Tiamaniere IEMW povas helpi al via landa asocio, metante la interesatojn en kontakto kun ĝi. Same sendu informilojn pri viaj aranĝoj en sufiĉe granda kvanto.

4) Kompreneble IEMW ankaŭ ricevas mon-donacojn. Vi povus ekzemple pagi aliĝ-kotizon al samideanoj, kiuj ne povas transsendi monon.

5) Informu pri la laboro de IEMW. Helpu, ke la esperantistoj konsciuj, ke IEMW estas *ilia* muzeo, *ilia* biblioteko.

Pluajn informojn donas: **Herbert Mayer, Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Batthyanystrasse, A-1010 Vieno, Aŭstrio.**



La heredaĵo de Hector Hodler

Parto 2: Pacismo kaj prudento

Jen la daŭrigo de la artikolo pri la fondinto de UEA en la decembra numero. Legantoj, kiuj ne abonis la revuon pasintjare, povas aĉeti unuopajn ekzemplerojn de la Centra Oficejo kontraŭ po tri gld.

Hodler ligis la esperantismon al parencaj ideoj kaj movadoj kiel pacifismo/internaciismo, kion antaŭ kaj post li emis fari multaj esperantistoj. Sed neniu samtempe tiel insiste gardis la apartan profilon de la esperantistoj, la tute specifan kontribuon de la esperantistoj al la plibonigo de la internaciaj rilatoj. En septembro 1912 Hodler skribis:

La internaciismo de UEA estas pozitiva; ĝi ne konsistas el vortoj, sed el agado. Se ni volas, ke la vivo internacia estu io alia ol motivo de paroladoj, ni devas klopodi por ĝin realigi, antaŭ ĉio krei inter la homoj praktikan servaron, ligi ilin per organizo, insisti pri tio, kio ilin unuigas. Ekster tio ni vidas nur vanajn alvokojn pri frateco, konfuzajn aspirojn, kies rezultatoj estas sensignifaj.

Kiel dirite, Hodler deziris ne prediki, sed agi.

Ni grupigas nur la homojn, kiuj deziras esti grupigitaj. Antaŭ ol proponi al la mondo ideon, kiel ajn bela ĝi estas, ni vidu, ĉu ĝi estas realigebla per limigita nombro de homoj. Tiun eksperimenton plenumas UEA, en tre modesta mezuro . . . Prediki al la mondo kaj poste realigi, estas la metodo de la teoriistoj. Oni ĉiam estas prava, kiam oni nur bezonas aserti. Ni preferas . . . agi unue, poste prediki . . . se tio estas ankoraŭ necesa. Kun nia limigita celo ni opinias, ke ni tiel utile laboras, se ne pli, por la plibonigo de la interpopolaj rilatoj, ol tiuj homoj, kiuj konstante parolas pri frateco inter la popoloj, kaj neniam faris ian seriozan klopodon por eĉ parte efektiviĝi siajn ideojn en la reala vivo.

Esperantiano – nome la membro de UEA, diference de la ordinara esperantisto – vidu en sia “Esperantio” la modelon de estonta homaro internacie solidara kaj kunlaborema.

En 1914 eksplodis la mondmilito. Ŝajnis detruigi ĉiuj esperoj pri kreo de mondo, en kiu homoj konsciuj sin unue homoj. Tamen, UEA ĝuste en tiu peza tempo impresis demonstris, je kio ĝi kapablas post nur ses jaroj de ekzisto. Utiligante la fakton, ke ĝi havis sian sidejon en neŭtrala Svislando, UEA per sia delegita reto organizis grandskale helpagadon dum la milito, perante korespondaĵojn inter civitanoj de la malamikaj landoj kaj liverante nutraĵojn, vestaĵojn kaj medikamentojn. Samtempe kun tiu praktika monstro de internacia solidareco Hodler vigle kontribuis al la planado de la postmilita ordo. En 1915-16 li verkis ampleksan franclingvan traktaĵon pri la paca organizo de la popoloj. Ĝi restis neeldonita, sed partoj aperis en diversaj periodaĵoj en Svislando, ekzemple la revuo *La Voix de l'Humanité*, organo de Ligo por Defendo de la Homaro kaj ekde 1917 ankaŭ de prepara komitato por la fondo de Ligo de Nacioj.

Kelkaj ĉapitroj de la studo de Hodler aperis serie en *Esperanto* inter julio 1915 kaj februaro 1917 – sub la titolo “La pacproblemo: Novaj vojoj”. Precipe legante ilin, ni konstatas, kiom da scio kaj klarvido Hodler havis pri bazaj problemoj de la internacia vivo. Li opiniis, ke postuloj de la nuntempo estas nacia libereco, demokratia regado kaj internacia ŝtatligo. Kelkrilate li anticipis tezojn, kiujn poste al pli vasta publiko prezentis la usona prezidento Woodrow Wilson. Sendube, Hodler apartenis al la teoriaj preparantoj de Ligo de Nacioj.

Hodler, kiu ofte kritikis la pacifistojn kaj socialistojn pro tio, ke ili ne koncentras sin al la batalo kontraŭ la sistemo, de kiu la milito devenas, nome kontraŭ la “interŝtata anarkio”, t.e. la kaosa, malpaca stato en la mondo, havis grandajn esperojn pri la kreo de Ligo de Nacioj. Li prave vidis, ke paco kaj sekureco sur la tergloba povos alvenigi tia jura ligilo inter la ŝtatoj, nome organizaĵo, al kiu la ŝtatoj pretos submetiĝi, precipe por la solvo de konfliktoj.

Sed li avertis samtempe kontraŭ tiuj, kiuj opiniis, ke por efektivigi fundamentan transformon de internaciaj rilatoj sufiĉos starigi novajn jurajn regulojn. Tiuj reguloj – laŭ Hodler – ne efikos, se ne samtempe transformiĝas la spirito de la homoj. “Senvalora paperaĵo restos la plej belaj teoriaj aranĝoj pri internacia ŝtatligo tiel longe kiel mankos ĉe la aktiva parto de la homaro internaciema spirito.”

Kio estas internacia spirito? Ĝi estas simple la apliko sur la kampo de la interpopolaj rilatoj, de la principo pri reciproka komprenemo kaj toleremo.

Oni povas vidi tie ĉi, ke Hodler aplikis al Ligo de Nacioj similajn kriteriojn por sukcesa funkciado kiel al UEA. Nome, en ambaŭ kunekzistu – kvazaŭ dialektika unuo – la organiza kohero kaj impeta idealisma penso. Ideoj per si mem ne kondukas al atingo de la celo, sed nur se ili estas praktike elprovataj, kaj, inverse, organizaĵo ne funkcias, se ĝin ne vivigas avangardaj ideoj.

Nemirige, ke Hodler bonvenigis la fondon de Ligo de Nacioj precipe el vidpunkto de la Esperanto-movado. Ĝian gravecon li priskribis jene:

Ni ĉiuj bone scias, ke vivpova estos tiu Ligo nur, se ĝi kunigas ne sole registarojn per juraj aranĝoj, sed ankaŭ kaj ĉefe popolojn per spirito de reciproka kompreno. Sen internacia neŭtrala lingvo, la popoloj restas plene fremdaj unu al la alia, eĉ se teorie kunigas ilin interŝtataj konvencioj. De la Ligo de la Nacioj la esperantistoj esperas do, ke ĝi frue rekonos la necescon de komuna interkomprenilo...

Tiuj esperoj – ke Ligo de Nacioj donos apogon al Esperanto – ne plenumiĝis. Hodler eĉ ne plu ĝisvivis la komencon de la klopodoj de la esperantistoj elbatali por sia lingvo rekonatan lokon en la mondorganizaĵo. La 31-an de marto 1920 li mortis pro tuberkulozo, je kiu li longe suferis, nur 33-jara.

La junaĝa amiko de la mortinto, Edmond Privat, multe klopodis por Esperanto ĉe Ligo de Nacioj. Ni ne eniros la detalojn tie ĉi. Sufiĉu memori, ke ja akceptiĝis raporto de Ligo de Nacioj favore al Esperanto, ke tamen la Ligo ne faris decidon subteni la plian disvastigon de Esperanto – ĉefe pro la kontraŭstaro de Francio. La sorto de Esperanto

ĉe Ligo de Nacioj montris, ke Ligo de Nacioj – kontraŭe al la atendoj de multaj, inkluzive Hodler – ĝuste ne iĝis tiu supera organo, al kiu la ŝtatoj cedos iom de sia suvereneco, kaj ke ĝi ne disvolvis internacian pensmanieron inter la popoloj, kiu helpu krei bazon por paca solvo de konfliktoj. La posta plena fiasko de Ligo de Nacioj kvazaŭ anonciĝis per la pritrakto, kiun ricevis Esperanto en tiu tutmonda forumo, kiam grandpotenca orgojlo subtabligis la klopodojn de la esperantistoj.

Bedaŭrinde, poste la esperantistoj emis turni al Ligo de Nacioj la dorson. Ili tro rapide kapitulacis antaŭ la malfortiĝo de internaciismo. Anstataŭ plue sekvi la admonon de Hodler, ke la esperantistoj pionire eduku al nova, internacia pensmaniero, ili koncentris sian rigardon denove pli multe al la agado en nacia kadro, direktante siajn esperojn al la unuopaj registaroj.



Hodler verkis elstare pri organizaj kaj filozofiaj demandoj de la movado, same kiel pri la teorio de internacia paco. Restas esperinde, ke UEA iam eldonos la plenan biografion kaj verkaron de sia fondinto.

UEA do ne firme daŭrigis sur la vojo montrita de Hodler. Parte tio ŝuldiĝas al la skismo, kiu okazis en 1921: nome la disdiĝo de “neŭtraluloj” kaj laboristoj. Temas pri la sekvoj de la fondo de SAT. E. Lanti, kiu en nekrologo pri Hodler nomis lin “nobla internaciisto”, fakte estis inspirita de Hodler rilate la ideon fondi asocion de individuaj membroj nedependan de naciaj societoj. Oni povas konstati, ke en la organiza strukturo de SAT konserviĝis eĉ pli de la originalaj impulsoj de Hodler, ol en la neŭtrala movado. Multaj pli progresemaj esperantistoj transiris de UEA al SAT kaj lasis la organizaĵon kreitan de Hodler al la influo de malpli larĝvidaj, politike nematuraj aŭ ideo neŭtralemaj personoj.

UEA havis en la unua jardeko post la morto de Hodler garantiitan ekziston, ĉar li testamentis al ĝi sian kapitalon.

Tiun monon la esperantistoj danke prenis, sed ne la ideojn. UEA precipe ekde la fino de la dudekaj jaroj alprenis pli kaj pli defensivan sintenon al la refortiginta naciismo kaj la timige disvastiĝanta faŝismo. Ĝi paralizis sin mem per sia false komprenita neŭtraleco, ne kuraĝante protesti kontraŭ ideoj kaj movadoj, kiuj minacis ne nur la pacon, sed la pluekziston de la homara civilizo. Kaj krom malatenti la spiritan heredaĵon de Hodler, la gvidantoj de UEA meze de la tridekaj jaroj forkonsumis ankaŭ lian kapitalon. Okazis nova skismo, ĉi-foje interne de la neŭtrala movado.

La sperto pri la persekutoj kontraŭ Esperanto en la Tria Regno kaj la antaŭenmarŝo de faŝismo fine, jam antaŭ la Dua Mondmilito, konsciigis al UEA la limojn de neŭtraleco. Ĝi komprenis, ke Esperanto nur povas ekzisti en ĉirkaŭaĵo, kiu permesas aŭ almenaŭ toleras la strebon

Sed, strange, estas preskaŭ forgesite, ke tian prudenton ni trovas jam ĉe la lulilo de UEA – antaŭ okdek jaroj. La ideoj de Hodler ne estas bone konataj inter la nuna generacio de esperantistoj, kvankam ili ĉiuj kutimiĝis uzi la delegitan reton kaj la servojn, kreitajn de li. Ni ne konscias, ke Hodler ne nur metis la bazojn por la praktika apliko de Esperanto, sed ankaŭ por la teoria difino de la agado por (kaj per) Esperanto.

Dum mi finverkis la manuskripton de tiu ĉi prelego, en miajn manojn venis la jubilea numero de la organo de UEA. Kaj jen mi trovis interalie du artikolojn de germanoj – unu de orientgermano, la alia de okcidentgermano. La orientgermano faras tre personan pledon por tio, ke Esperanto estu pli ol lingvo: Esperanto estas, laŭ li, la konkreta esprimilo de la idealo pri interkompreniĝo – la paradigmo de absolute necesa, ĉiodecida nova pensado, de la alianco de prudenteco, kiu sola garantias al la homaro la transpaŝon en la trian jarmilon. – Precize tion jam antaŭ longe esprimis Hodler, kiam li alvokis la esperantistojn esti avangardo en la eduko al nova, internacia pensmaniero, sen kiu la paco ne povos esti firmigita.

Kaj la okcidentgermano zorgas pri la efiko, kiun havas en la publiko utopiaj sloganoj de la esperantistoj. “Ni... ne aperu kiel movado de postmorgaŭ, kiu konstante revas pri la paradiza mondo post la ‘fina venko’.” Sed: “Ni devas aperi kiel movado de hodiaŭ; movado, kies anoj tenas vastajn internaciajn kontaktojn, interesiĝas pri fremdaj kulturoj, ŝatas vojaĝi; movado kun praktikaj valoroj hodiaŭ.” Ankaŭ tion jam Hodler diris, kiam li formulis la fondiĝan filozofion de UEA. En 1909 li kritikis la ĝistiaman emon montri al la publiko la estontan utilon, kiun al la tuta mondo alportos Esperanto, kaj kontraŭmetis al tio sian postulon, ke la esperantistoj ekuzu sian lingvon kaj tiel demonstreu, ke Esperanto estas utila jam nun.

Jen do la aktualeco de Hodler, kiun nekonscie substrekas la jubilea numero de *Esperanto*. Kaj mi finu, citante vortojn de Hodler (el 1919), kiuj same restas aktualaj, tute aparte ĉe la sojlo al nova jarcento. Li skribis: “Tio, kion ni emfaze nomas la ‘triumfo de nia afero’ ne estas io estonta kaj malproksima; tiu triumfo konsistas el aro da ĉiutagaj konkretaj sukcesetoj nun realigeblaj. Esperanto ‘triumfas’ ĉiufoje kiam ĝi servas al iu.”

Ulrich Lins



al interhoma komunikado. La novfondita UEA en 1947 tuj deklaris sin ligita al la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj komencis kunlabori kun Unesko, en kies konstitucia preamblo estas postulite – tute simile kiel Hodler diris – ke oni komencu la konstruon de la paco en la mensoj de la homoj. Kaj ĝenerale nun oni konscias pri la bezono de enkonduko de internaciismo en la ĉiutagan vivon.

En la lastaj kvardek jaroj UEA akiris ĝenerale pli da kompreno, pli da sentokapablo, pri la politikaj, sociaj kaj ideaj implicoj de sia agado por Esperanto. Oni ne plu povas riproĉi al ĝi malmoralan neŭtralismon – same kiel maljustaj estas asertoj pri unuflankeco/partieco de UEA. Ekregas en la movado pli da prudento, matureco kaj sobro.

BIBLIOGRAFIO

- Hector Hodler. Lia vivo kaj lia verko**, Ĝenevo 1928. – Elektitaj artikoloj de Hodler; kun biografia skizo de Eduard Stettler.
- H. Hodler, *Der Esperantismus*, Ĝenevo 1913. – Aperis ankaŭ en la angla kaj franca lingvoj.
- E. Adam, “Mortis nobla internaciisto”, en *Esperantista laboristo* (Parizo), vol. 1, 1920, n-ro 4, p. 1-2.
- Edmond Privat, “Morto de Hector Hodler”, en *Esperanto*, vol. 16, 1920, p. 61-62.
- Edmond Privat, “Hektor Hodler 1887-1920”, en *Senacieca revuo*, n-ro 82, 1954, p. 2-4.
- H. W. Holmes, “Hector Hodler kaj la fondo de U.E.A.”, en *Esperanto*, vol. 61, 1968, p. 46-48.
- Claude Gacond, artikolaro pri Hector Hodler, en *Monata cirkulero*, Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds), 1980/81, n-roj 119-129.

TEJO bezonas UEA, kaj inverse

Ŝokan, sed iel pravan rimarkon faris Osmo Buller pri TEJO en *Esperanto* 11/88 p. 201. Pravan – surbaze de kion li legis en la juna numero de la revuo (6/88 p. 109), kio tamen ne povas esti agnoskita kiel sufiĉa mesaĝo pri la junulara branĉo de UEA.

La kialoj por altigi la aĝlimon de TEJO nur unuavide estas financaj. Origine, la kialoj estis du: krei aĝlimon por la TEJO-gejunuloj kiu respondas al ĝenerala socia homa sinteno (junaĝo certe ne finiĝas je 25-jara limo), kaj alĝustigi ĝin al la plejmulto de la laŭregularaj aĝlimoj de la landaj sekcioj de TEJO kaj la jam ekzistanta aĝlimo por la gvidantoj de TEJO (kiu de longe estas 30 jaroj). Kiam TEJO venis kun la propono al UEA, la sola-nura reago estis timo pro financaj implicoj. Nur tiam la financa flanko estis transformita de iuj en *la vojon* por solvi TEJO-problemojn. Tio estas nek ĝusta, nek vera.

La dua “ion entreprenas” ero kiun elstarigas Buller estas la altigo de la kotizoj por patronoj. Nu, tio devis okazi por redoni (almenaŭ parte) la sencon al la vorto *patrono*. Tre bonan klarigon pri tio donas Claude Rouget en *Esperanto* 10/88 p. 167. Mi devas nur aldoni, ke el pure teknika vidpunkto la antaŭa kotizo por patronoj estis kalkulita nur por ricevi al ili la revuon *Kontakto*, kaj dume la servoj al patronoj multnombriĝis kaj kvalitiĝis (vidu la menciitan artikolon de Rouget). Do, unue – la altigo devis okazi por ke TEJO ne krompagu servojn al patronoj, due – por ke patronoj havu patronan sintenon. Mi do esperas, ke Osmo Buller kaj pluraj aliaj estiĝos niaj patronoj.

Tiuj du aferoj ne estas ja ĉio kion entreprenas TEJO. Okazas pluraj tre diversspecaj kaj diversnivelaj aktivecoj. Tre bone funkcias la kongresa agado. Ni revenis al kutimo decidi pri la kongresloko kun almenaŭ dujara anticipe (Nederlando 1989, Kubo 1990, Svedio 1991). Faka agado ĉesis esti nur biciklado al kongresoj. Ekzistas movado naturprotektita de junaj esperantistoj, lanĉiĝis TEJO-kunlaboro kun AIS, celanta restarigi fortan studentan fakan agadon. En eksteraj rilatoj, denove certaj sukcesoj. Okazis laste seminario pri Nova Internacia Informa kaj Komunika Ordo de TEJO kaj Internacia Unuiĝo de Studentoj, kun aŭspicio kaj financa subteno de UNESCO. En preparo estas novaj KER-seminarioj: paske en Grésillon pri la eŭropa generacio de la jaro 1992, aŭtune aŭ vintre en la Eŭropa Junulara Centro pri antaŭjuĝoj inter popoloj kaj kiel ilin forigi. TEJO partoprenas la laborojn por la 13-a Monda Festivalo de Studentaro kaj Junularo, kaj lanĉis kunlaboron kun OCLAE, regiona studenta organizaĵo internacia en Latina Ameriko. Tre gravan rolon havas nun *TEJO-tutmonde*, kiu fariĝis la oficiala organo de TEJO, dum *Kontakto* (kies eventualan nuligon de tempo al tempo proponas UEA) tre grave rolas kiel kultura kaj eduka revuo por la juna esperantistaro. Pri landa agado de TEJO atestu la fakto de konstanta nombra kresko de la landaj sekcioj (de 24 en 1985 al 29 en 1988). Estas prilaborataj pliaj aliĝoj.

La bonaj flankoj tamen ne sufiĉas por kontentigi. En TEJO ekzistas ankaŭ problemoj kiujn oni ne preteratentu! TEJO ne povas superi certan nivelon/limon de aktivado malgraŭ oftaj potencialaj ebloj. TEJO ne havas sufiĉan infrastrukturon. Al TEJO mankas homfortoj! Ni povus atingi multe pli se:

- ekzistus sistema trejnado de la aktivularo por TEJO-agado – tia aktivula trejnado devus esti la ĉefa fonto de TEJO-fortoj;
- ekzistus pli serioza rekono flanke de UEA. Laŭ la membraro TEJO estas *kvarono de UEA*; laŭ la reala trakto – ofte kvazaŭ nedezirata fremdulo.

Tiel, do, TEJO daŭre baraktas kun amasa problemaro. Al la du supraj punktoj aldoniĝas amatoreco kaj foja neseriozeco, sed ili estas la rezulto de la du ĉi-supraj

TEJO-IUS SEMINARIO:

Utila malgraŭ komunikaj problemoj

Junuloj malemas eviti tiklajn temojn. Ne estis do hazarde, ke TEJO kaj la Internacia Unuiĝo de Studentoj elektis kiel eble plej disputigan koncepton kiel kadron por komuna seminario. Pri la “Nova Monda Informa kaj Komunika Ordo” diskutis ĉ. 35 junaj esperantistoj kaj studentoj dum novembra semajnfino en Blaricum-Huizen, Nederlando.

La ĉeesto de ambaŭ prezidantoj – Jan Koszmaluk (TEJO) kaj Josef Skala (IUS) – substrekis la seriozon, kiun oni volis doni al la aranĝo (subvenciita de Unesko). Pli ol dek kvin landoj reprezentis, el ĉiuj kontinentoj. Enkondukojn pri la temo provizis konataj homoj kiel Barbara Despiney (UEA-estrarano kaj reprezentanto ĉe Unesko), Brian Moon (tradukisto ĉe la Eŭropa Komunumo), Stefan Maul (la redaktoro de *Monato*, kies referaĵon resumis Alex Humet), kaj la unua prezidanto de la Nederlanda Unuiĝo de Ĵurnalistoj, s-ro W. G. Klingenberg. Sed... ĝuste ĉe la informa kaj komunika flanko de la programo ŝajnis manki io (nelaste pro la uzo de du laborlingvoj, Esperanto kaj la angla).

Montriĝis, fakte, kiel malfacile estas, paroli profunde pri ideo tiel abstrakta sen antaŭscio kaj preparo. La invititaj fakuloj ja provis mildigi tiun problemon per siaj kontribuoj. Esperantistoj cetere kutimiĝis, ke aliaj malmulte scias pri lingvaj problemoj kaj ilia solvo. (La IUS-anojn pli ŝokis tio, ke la gemovadanoj ne orientiĝas pri la monda politiko.) Sed rezultis, ke plej parolis la ekspertoj, kaj la partoprenantoj mem emis pretertrafi unu la alian per siaj intervenoj.

Tiun tendencon bone ekzemplis la lasta mateno. Sperta profesia ĵurnalista, ĵus reveninta el okcidenta-orienta konferenco en Moskvo, parolis pri la postuloj kaj malfaciloj de gazetara laboro; esperantisto prezentis la novaĵrevuon *Monato* kiel ekzemplon de alternativa solvo.


faktoroj. La tria kaŭzo estas la juneco mem kaj mal-longaj aktivecgeneracioj – tio kaŭzas foje tro rapidan ŝanĝigon de homoj.

Do, jen, mi venas al alia ŝoka konkludo: krizoj estas permanenta eco de TEJO, kaj barakto kontraŭ ili estas la ĉefa agado de la estraro kaj la prezidanto; fojaj “atingoj” estas reveno al normaleco (kiel devus esti ĉiutage).

Estas, do, strange ke (eventuale kun kelkaj esceptoj) la “maltejo” tute ne interesiĝas pri la junularaj aferoj. Mia opinio, nepras ke UEA starigu al si demandon pri la rolo de la junularo esperantista en la movado kaj ne nur faru seriozajn studojn, sed serioze traktu la aferon (ĉu eble komuna komitatkunsido de UEA kaj TEJO?). La junularo estas tiu forto kiu disponas pri plej da energio; la adoltaro – pri spertoj. Kial ne ekspluati tion? Kial ne helpi profesiigi la nivelon de la agado de TEJO? Kial ne kun-krei trejnad-manierojn por junaj aktivuloj?

Kiam revenos la jaro de la junularo en UEA?

Jan Koszmaluk
Prezidanto de TEJO



La IUS-anoj parolis pri monopoliĝo de la komunikiloj en la okcidento; la TEJO-anoj parolis pri la fremdeco kaj elitismo de alilandaj ĵurnalistoj. Objektive, ambaŭ flankoj parte pravis, ambaŭ ankaŭ troigis. Sed mankis la komuneco de emfazo kiu ebligus fruktodonan diskuton.

Tamen ne forargumenteblas la granda utilo de la seminario: nome, ke gejunuloj el ege diversaj fonoj ĉeestis samloke dum du tagoj por diskuti mondajn problemojn, kaj eĉ venis al interkonsento pri kelkaj ideoj. “Komunikado estas antaŭkondiĉo, necesa se ne sufiĉa, por demokratio, paco kaj evoluo,” konstatis la IUS-prezidanto, kaj volonte konsentis al Esperanto gravan rolon tiurilate. La du organizaĵoj plu kunlaboros por el-labori kaj disvastigi koncizan demandaron pri NMIKO, celotan al studentaj kaj junularaj rondoj tutmonde: Ĉu ili konscias pri la temo, ĉu ili mem spertas mankon de informoj aŭ malhelpon en la komunikado, precipe rilate aliajn landojn, kaj kion ili konsiderus plibonigo? Tiaj informoj devos cetere utili al TEJO, ĉar ja Esperanton oni lernas pro similaj motivoj.

mf

Kalendaro

Pliaj detaloj pri la subaj aranĝoj estas ofte, sed ne ĉiam, haveblaj ankaŭ de la Centra Oficejo (tel. +31 10 436 10 44 / Mark Fettes). Bonvolu sendi erojn por la marta tutjara Kalendaro antaŭ la 10-a de februaro.

daŭre “**Esperantotur**”, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando
Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando
Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica), Pf. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario
Esperanto-sekcio de Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo “Express”, Pk. 567, H-1395 Budapest, Hungario

1989

januaro

28-29: **Studa semajnfino “Al tutmonda civitanismo”**, KCE, Svislando (adreso supre)

februaro

05-12: **14-aj Esperantaj Tagoj de Bydgoszcz**, Pollando (Esperantotur, adreso supre; samtempe la 5-a Tutpollanda Konkurso de Esperantaj poezio kaj kanzono por mezlernejanoj)
10-12: **Skipromenada semajnfino**, Heusy (Verviers), Belgio (Marie Grela, rue de la Colline 16, G-4840 Welkenraedt)
11-13: **Bahaa renkontiĝo**, KCE, Svislando
13-18: **Seminario “Mahatma Gandhi kaj Edmond Privat”**, KCE, Svislando
19-26: **Semajno de Internacia Amikeco**
20-25: **Seminarioj “Kio estas alternativa agrikulturo” kaj “Trejnado al la Cseh-instruado”**, KCE, Svislando

marto

04-05: **1-a Svisa Esperanto-Kongreso**, Ĝenevo, Svislando (informoj ĉe KCE, adreso supre)
09-11: **Internacia Foiro Esperantista Renkontiĝo (IFER)**, Leipzig, Germana DR (Kulturbund der DDR, Esperanto-Asocio, Käthe-Kollwitz-Str. 115, DDR-7010 Leipzig)
13-majo 19: **8-semajna kurso por progresantoj**, Karlskoga Popolaltlernejo, Svedio (Pf. 192, S-69124 Karlskoga)
20-27: **Printempa Semajno Internacia**, Hopsten (Vestfalia), FR Germanio (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-4418 Nordwalde; temo “Vojoj al pli bona kunvivado inter gepatroj kaj infanoj en eŭropaj familioj”)
22-28: **13-a Internacia Junulara Festivalo**, Savona, Italio (Anna Cosenza, V. Diaz 14, I-34170 Gorizia GO; temo “Eŭropo, havenoj, kulturo”)
23-28: **KER-Seminario “Eŭrogeneracio”**, Kastelo Grésillon, Francio (Aline Boulet, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris)
24-27: **73-a Brita Kongreso de Esperanto**, Stoke-on-Trent, Anglio (W. H. Simcock, Clayton House, Butterton, Leek, Staffs., Britio ST13 7SR)
24-27: **“Bel(g)ajoj en Nederlando”** (junulara renkontiĝo), Baarle-Hertog, Nederlando (Ron Doesborg, Nederland-plein 41, NL-5628 AE Eindhoven)
25-26: **Kvara Internacia Renkonto “Ivan Flanjak”**, Osijek, Jugoslavio, kaj **Simpozio “Tibor Sekelj – Ĵurnalistoj kaj verkistoj”** (Antun Šimunić, EKCE, Dž. Bijedića 7/1, YU-54000 Osijek)
25-27: **“La montaro Ĵuraso ekprintempe”**, KCE, Svislando
25-28: **44-a SAT-Amikara Kongreso**, Pézenas (Hérault), Francio (SAT-Amikaro, 67 avenue Gambetta, F-75020 Paris)
29-05: **2-a Internacia Sovetia Esperantista Junulara Tendaro**, Minsk, Belorusio (Junulara Komisiono de ASE, prosp. Kalinina 14, SU-103885 Moskvo, Sovetunio)
31-07: **Internacia Renkonto de Infanoj kaj Seminario pri Instrumetodoj**, Kastelo Grésillon, Francio (F-49150 Baugé)

Jen parto de la artikoloj kaj leteroj, kiujn ni ricevis en la lastaj monatoj kaj kiuj rilatas iumaniere al la projektita Strategia Plano (Esperanto 1988/10, p. 168-177). Ja, ne ĉiuj limigas sin al principoj disde detaloj – ankaŭ la Plano ne faris tion. Ne eblas, cetere, realisme diskuti strategion sen havi ideon pri efikaj taktikoj. Per la publikigo de

ĉi-kelkaj reagoj (ĉerpitaj plejparte el pli longaj tekstoj), ni esperas stimuli vian propran pensadon kaj kunlaboremon. En februaro daŭros la diskuto.

Kaj intertempe – ĉu vi konas aktivulojn taŭgajn por la Komitato de UEA? Kandidatigu ilin laŭ nia novembra instigo (p.186)!

Azio nepre bezonas veran Esperanto-centron

Dum la somero 1988 mi havis okazon tri monatojn vojaĝi, studi kaj sperti en Ĉinio. Mi havis eblecon vidi la ĉinan movadon de tre proksime, kaj renkontiĝante kun aliaj Aziaj esperantistoj mi informiĝis pri la stato de Esperanto en Azio. (Tamen mi ne konsideras min spertulo pri Azio. Eĉ Ĉinio tiom grandas, ke unuopa persono povas kompreni kaj vidi nur parteton.)

En la Strategia Plano oni konstatis i.a. ke en Azio evoluas la movado. Fakte pli ĝuste estus skribi ke la Azia movado *eksplozas* en ĉiuj direktoj. Plej multaj esperantistoj en Azio estas junaj kaj aktivaj, sed malriĉaj. Ili ne havas eblecojn propramane vojaĝi eksterlanden, ofte eĉ ne por pagi la membrokotizon de UEA! Ofte ili estas izolitaj de la ekstera mondo. Sed laŭ mia sperto azianoj, same kiel ĉiuj aliaj, rapide lernas paroli, ĉar ili jam alproprigis al si almenaŭ

pasivan lingvoscion. Mankas nur la vera utiligado de la lingvo.

La Azia movado bezonas iom pli ol nur informon ke ekzistas iu UEA kiu havas oficejon en iu Roterdamo ie en Eŭropo. Por multaj azianoj Eŭropo estas kiel alia mondo, en multaj aspektoj nereala kaj stranga afero. Oni sentas ke UEA estas kaj ankoraŭ restas Eŭropa, kvankam ĝi nomiĝas “universala”. Aliflanke, Aziaj esperantistoj bezonas komunan forumon por kontaktiĝi kaj kunlabori. Konkreta centro, konstruaĵo, estus kiel “hejmo” por azianoj, loko kiu funkcius kiel ekstera vidindaĵo kaj kiel interna oficejo.

Tre gravas ankaŭ ke Azio prizorgu Azion. Por UEA tio faciligus multajn aferojn. En la Strategia Plano oni cetere mencias ke en Ĉinio ekzistas vastaj tavoloj de homaj fortoj kiuj povus esti utiligataj (44b). Nature ilia aktivigo okazus plej efike loka, proksime al la homoj kiuj

povus vidi la fruktojn de sia laboro.

Oni devus detale diskuti la karakteron de eventuala centro. Sed Azio bezonas centron kiu almenaŭ:

- 1) administru; 2) kunordigu; 3) informu interne kaj ekstere; 4) kontaktiĝu rekte kun UEA (Roterdamo) kaj landaj asocioj; 5) estu kontakto-forumo por Aziaj esperantistoj; 6) havu kontaktojn kun oficialaj instancoj, ekz. edukaj kaj kulturaj; 7) organizu altnivelajn kursojn; kaj 8) aranĝu gastigadon por vojaĝantaj esperantistoj (tio povus esti enspeziga). Laŭ mia sperto la proponita provinco Shandong estas tre taŭga loko: i.a. tie ege aktivas la esperantistaro, kaj ĝi estas facile atingebla de ĉiuj direktoj.

La Azia centro estus paŝo survoje al malcentrigo kaj vera tutmondiĝo de UEA. Sed plej grava ĝi estus por la azianoj mem, en la evoluo de la Azia movado.

Sabira Stahlberg (Finnlando)

Venis tempo por pli scienca agado

Komercisto vendanta altkvalitan varon, kiu ege superas ĉion ofertatan en la merkato, normale sukcesas. Se tio ne okazas, konsilindas konsulti psikologon. Tiu esploru la motivojn de la rezistemo en la eblaj klientoj. Krome, varbfakulo verŝajne kapabla trovi taŭgan manieron por efika vendado.

Lingvospertaj homoj scias, ke Esperanto estas ege esprimkapabla komunikilo. Neniu dubas, ke la akcepto de unu internacia lingvo eksterordinare faciligus la tutmondajn internaciajn rilatojn, ŝparte krome milionojn da dolaroj.

Do, pli ol prezenti motivojn favore al la ĝenerala akcepto de Esperanto en lernejoj kaj internaciaj inter-

traktoj, necesas esplori la kaŭzojn de la menciita ne-akcepto. Tial proponindas konkurso kun tre alloga premio por la plej trafa respondo. En tiu konkurso psikologoj kaj varbfakuloj (ankaŭ ne-esperantistoj) difinu klare: 1) motivojn de ne-akceptemo de la internacia lingvo inter influhavaj altranguloj; kaj 2) la plej taŭgajn metodojn por superi tiun sintenon.

Se tiu procedo ne plaĉus, UEA povus komisi ion tian al mondfama fakinstituto por varbado. Krom la bela entuziasmo, kiu mondvaste prosperigas la internacian lingvon, oni bezonas verŝajne science efikajn agmanierojn.

Werner Schad (Argentino)

Eduki, jes, sed ankaŭ laŭe agi

En la prioritata listo post disvastigo kaj utiligo de Esperanto rangas edukado al tutmonda konscio. Mi starigas la demandon, kial kaj kiel organizaĵo kiel UEA, kiu ekskluzive antropocentre difiniĝas, povas aŭ rajtas arogi al si “eduki al tutmonda konscio”? . . . Ekologio certe estas io, al kio oni povas kaj devas esti edukata. Tamen UEA evidente ne akceptas ekologion kiel same neŭtralan kiel la Homajn Rajtojn kaj la pacon. Ĝi absolute ne, t.e. per nenio aludo, sentas la bezonon organiziĝi konforme al la biosferaj necesoj.

La minimumo laŭ mi, kion UEA devas enmeti en la kapan parton de ĉiu strategia papero, estas

(pli-malpli) konvinka priekologia konstato. Ekzemplo povus esti: "UEA en sia laboro devenas de la fakto, ke la pluevoluo de la internacia kunvivado inter la homoj okazu laŭ la regularoj pri la Homaj Rajtoj kaj la paco kaj laŭ la ekologiaj principoj kaj longvida sekurigo de la estonteco."

Wolfgang Gunther (FR Germanio)

Admirinda

Ĉar komentojn vi deziras, kaj ĉar mi suspektas, ke laŭ la homa kutimo vi ricevos multajn kritikojn . . . kaj multajn nerealismajn proponojn, mi skribas nur por mencii, ke mi *tre admiras* la Strategian Planon, kiu ŝajnas al mi kohera, detala, kaj tre pripensite ellaborita. Mi deziras al ĝiaj plenumantoj grandiozan sukceson.

Marjorie Boulton (Britio)

Ĉu nova rolo por la Centra Oficejo?

La financa bazo de UEA daŭre restas ĉirkaŭ kvin mil personoj vivantaj en landoj kun fortaj valutoj. Tio sufiĉas nek por rimarkinda disvolvo nek por longdaŭra vivteniĝo de nia Asocio. Urĝe necesas do, ke UEA trovu novajn fontojn de rimedoj por sia ekzisto kaj disvolvo. Tiuj fontoj etendiĝas ja ekster nia movado. Ni ne parolu pri petado al riĉuloj; ni prefere mem gajnu rimedojn por la Asocio. Tiucele necesas do krei proprajn entreprenojn por produkti servojn kaj varojn destinitajn por neesperantista klientaro. UEA mem kreis Grafikan Centron Antverpeno, lastjare venditan al Flandra E-Ligo. Tute nature UEA posedu vojaĝagentejon, lingvo-centron . . . En landoj kun netranspagebla valuto oni kreu komunajn

entreprenojn. Leĝoj tiurilate en Orienta Eŭropo (Sovetunio, Hungario, Pollando) kaj ankaŭ en Ĉinio lastatempe ŝanĝiĝis favore al eksterlandaj investoj.

La Centra Oficejo de UEA devus ŝanĝi sian rolon de kotizkolektanto al entreprenanto. Tial necesas klare disigi la bazan agadon kaj tradician membraran priservon disde profitcela aktivado. La direktoroj de la entreprenoj posedu larĝan decidopovon. Krome la entrepreno prioritata priservu UEA kaj pagu al ĝi fiksitajn procentaĵon de sia profito.

Ŝajne utilus, se la Estraro invitus kelkajn organizajn fakulojn pritrakti kune kun la direktoroj la aktualan funkciadon kaj strategion de la CO por la plej proksima kelkjarro.

Marian Dobrzyński (Pollando)

Iranaj sugestoj: UEA en la Tria Mondo

Jen resumo de referaĵo el la Simpozio pri UEA en Roterdamo, kies aktoj haveblas fotokopie de la CO kontraŭ 15,00 gld.

Niajn sugestojn ni pritraktas en tri partoj.

1. Du gravaj mankoj de Esperanto estas (a) baza scienc-teknika literaturo, kaj (b) facilaj legaĵoj por komencantoj kaj post-elementaj kursoj. Sen la unua, Esperanto kiel solvilo de profunda problemo en la Tria Mondo neniel serioze havas allogon por ties kleruloj. Tial ni bezonas fondaĵojn kaj subvenciojn, kaj klopodoj plenigi la breĉon devus fariĝi kelkoblaĵ! Manko de la dua kontribuas multe al maldaŭrigo de amasoj da komencantoj. La plej serioza revuo, kiu jam priatentis la bezonon, estas *Kontakto*; tial ne indas redukti la numerojn. Estus ege utile se i.a. *Kontakto* ĉiun kelkan jaron aperigus siajn plej facilajn artikolojn en unu volumo, kun demandoj kaj respondoj, kiel akompana lernolibro por komencantoj.

2. Koresponda Servo Mondskala ekzistas, tamen unuopa gvidanto volontula ne povas respondi al ĉiam kreskanta deziro de triamondaj

komencantoj. Tiuj komencantoj kompreneble ne regas la lingvon, sed per korespondado ili deziras certigi sin (a) ke Esperanto vere vaste ekzistas, (b) ke ĝi ne ligiĝas kun politika aŭ religia tendenco, (c) ke eblas tiel kontakti homojn el la onidire libera mondo kaj eventuale peti helpon, kaj (ĉ) ke oni eble povus ricevi librojn, revuojn ktp donace de eksterlando.

3. Trejnado de homaj fortoj en la Okcidento, kiu dum lasta jarcento multe riĉiĝis je tradicio kaj sperto pri Esperanto, plenigus ian vakuum en la Tria Mondo. Pro tiu vakuo, Esperanto-amantoj de nia regiono aspektas eble tro verdaj. Tial necesas plani, starigi kaj plenumi specialajn projektojn, inkluzive de stipendioj, vojaĝoj ktp. Ordinare, tiuj kiuj unuafoje vojaĝas al Okcidento suferas de t.n. kultura ŝoko dum ĉ. kvar ĝis ses monatoj. Tial la planataj stipendioj devus esti inter naŭ monatoj kaj unu jaro. UEA ne bazu la evoluon de Esperanto sur blinda konfido ke ie, iu, iam, iel, eble ekkonus Esperanton, eklernus kaj daŭrigus lerni ĝin, kaj espereble ankaŭ povus labori por ĝi!

4. Kopirajto bezonas diskuton

triamonde. La valoro, koncepto de kopirajto kaj t.n. pirat-eldono tute malsamas en Okcidento kaj en la Tria Mondo. . . . Esperanto krome havas apartajn kialojn, kiuj devigas ofseti jam (okcidente) presitajn librojn en la Tria Mondo. La kialoj i.a. jenas: (a) malfacila disponebleco de latin-litera tipografio; (b) aldona malhelpo de supersignoj; (c) disponigo de pli ampleksaj vortaroj kaj lernolibroj al studentoj. Oni unue permesu, ke oficialaj instancoj akceptu Esperanton, kaj poste kverelu pri tiel nomata piratado!

5. Konklude: Kiam iu eldonisto pretus riski kapitalon por eldonado de lernomaterialoj, tiam oni povus ek trovi esperon pri la progreso de Esperanto en la Tria Mondo. Usona kolego, R. Kent Jones, skribis en sia anonco en *Esperanto* (1988/n-ro 7-8): "Nia 9-landa teamo de kemiistoj tradukis [574-paĝan lernolibron] laŭ la peto de triamondanoj por scienca materialo. Tial ni senkoste donos al ili la rajton presi kaj vendi ĝin laŭvole." Faru kiel Jones faras, por pli efektiva integrado de kunlaboro, pere de UEA, por evoluigi Esperanton en la Tria Mondo.

Jila Saheb-Zamani (Irano)

Pri generaciaj problemoj en la Esperanto-movado

La vivo de esperantistoj povas esti dividata en la sekvantajn fazojn: 1-e estas la TEJO-fazo (vojaĝoj kun dorsosako, junularaj renkontiĝoj, TEJO-kongresoj, geamikiĝoj, geedziĝoj); 2-e venas la vera vivo (laboro, familio, infanoj); 3-e venas la UEA-fazo (vojaĝoj kun valizo, inaŭguro de Esperanto-stratoj, Universalaj Kongresoj); 4-e venas la fazo de honora membreco kaj veterana klubo.

Estas evidente ke la dua fazo estas la plej malfacila por aktivaj esperantistoj kaj ke UEA kaj la ceteraj Esperanto-instancoj devas doni tre grandan atenton al tiu hom-grupo, ĉar aliflanke estas ĝi, kiu plej grave rolas en la normala mondo en ĉiu difinita momento.

Tio tute klare, kvazaŭ skulptite en marmoro, evidentas en la lasta laborplano de UEA. Kion, do, ni povas ekfari por realigi tiujn punktojn de la laborplano?

Unuflanke ni neformale faru la

unuajn paŝojn por fondo de iu *Rondo Familia*. Tiu Rondo en la komenco estu nur kolekto de adresoj de ĉiuj esperantlingvaj familioj, en kiuj Esperanto estas uzata inter almenaŭ parto de la kunloĝantaj membroj de la familio. Do, *familioj uzantaj Esperanton anoncu vin!* Ĉi tiu estas la unua sistema provo de popolnombro de la ĉiutagaj uzantoj de Esperanto; certe vi ne volos malĉeesti. Vi povas anonci vin ĉe la Centra Oficejo de UEA aŭ ĉe la UEA-komitatanoj R. Corsetti aŭ Z. Tišljär (adresoj en la Jarlibro).

Temas esence pri adresaro por ebligi interŝanĝon de vizitoj (tio estas ekstreme grava por pluteni la esperantistecon de infanoj kaj por eviti la "kulturan" izolitecon de la gepatroj). Temas krome pri disvastigo de la renkontiĝoj por esperantlingvaj familioj, laŭ modelo sukcese aplikata en Hungario kaj najbaraj landoj dum dek jaroj. Tiuj

renkontiĝoj nepre devas esti pluraj en pluraj mondopartoj.

Temas fine pri kunordigata disvastigo de porinfana literaturo kaj kantoj (iusence la vera esperantista folkloro. Kiu el la legantoj scias kiun rimaĵon oni uzas kombante infanon?).

Apud ĉi tiu tuta agado, kompreneble oni devas pensi pri paroj sen infanoj kaj pri esperantistoj kun neesperantista partnero. . . .

Nu, eblecoj por fari ion por homoj en la dua vivfazo (laŭ la supra disdivido) estas abundaj. Necesas nur ekfari kaj la rikolto ne povas ne esti same abunda, ĉar tiuj homoj, kiuj normale uzos Esperanton dum la vespermango tra la tuta jaro, estos la malmola kerno de la esperantlingva komunumo, tiu kerno kiu certigos la vivon de la lingvo kaj ties evoluon preter ĉiuj favoroj kaj malfavoroj de instancoj kaj instanculoj.


Renato Corsetti (Italio)

Loke

● **Brazilo:** Ekde junio 1988, la portugallingva eldono de *Jurnalo de LBV* (Legio de Bona Volo, vd. *Esperanto* 1988/p.127), kiu aperas en 150 000 ekzempleroj, publikigas Esperanto-kurson de UEA-ĉefdelegito Jorge das Neves. Tiu krome gvidas kurson por 20 oficistoj ĉe la LBV-filio en Rio-de-Janeiro. Bildkarto, leteroj ktp bonvenas pere de Carlos Roberto Rodrigues da Silva, LBV, Av. Venezuela 43 Centro, BR-20081 Rio de Janeiro.

En la gazeto *O Pharol* (La lumturo) de la urbo Petrolina aperis serio de 17 rubrikoj pri Esperanto, kun multaj ĝisdataj informoj pri la movado.

● **Finnlando:** Esperanto-Societo de Oulu festis sian dekjariĝon en novembro, kaj invitis la redaktoron de *Esperanto*, Mark Fettes, prelegi tie. La organizantoj eluzis la okazon por akiri intervjuojn kun tri ĵurnaloj kaj unu radiostacio, modelo por ĉiu klubo kiu gastigas eksterlandan esperantiston.



● **Hispanio:** Okaze de la Hispana Kongreso de Esperanto, en la preĝejo "Virgin de Lourdes" de Valencio, estis baptita la dumonata infano Victor Enrique, filo de la prezidanto de la LKK. Pastro Manuel Casanove celebris kaj la meson kaj la bapton en Esperanto, kaj la demandoj, konsiloj kaj respondoj al la gepatroj kaj gebaptopatroj same okazis en la internacia lingvo.

● **Irlando:** Ekzistas nun du E-klubo en Dublino, kiuj organizis du-semajnan ekspozicion en la urbo-centro kaj aranĝis prelegon de komitatano Maire Mullaney ĉe la universitato (Trinity College) en oktobro. La kluboj gastigos la UK-postkongreson en 1989: skribu al EAI, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.

● **Italio:** En oktobro 1988 en Verona okazis ronda tablo pri "Esperanto en informadiko", kie parolis i.a. Toon Witkam (BSO), Carlo Minnaja (Padova Universitato), Aldo Bergamaschi kaj Giordano Formizzi (Verona Universitato). Ĉeestis la itala vicministro pri trafiko, Angelo Cresco, kiu prezidas la italan parlamentan grupon "Amikoj de Esperanto".

● **Katalunio:** Cento da homoj ĉeestis la Internaciajn Florajn Ludojn en la urbodomo de Barcelono fine de oktobro 1988. Tiu tradicia festo de la Esperanta kulturo datiĝas jam de la 5-a Universala Kongreso en 1909; premiojn ĉi-foje forportis Pier Giorgio Soranzo, Timothy Brian Carr, Albert Goodheir kaj Charles Berga i Molina. Sekvis tritaga "literatura forumo" pri la etnaj literaturoj de

Okcidenta Eŭropo, kun prezentoj pri la cigana, kimra, retoromanĉa, kataluna, baska kaj galega. Laŭ la partoprenantoj, ekfloranta etnismo pli gravigas la kulturperan rolon de Esperanto.

● **Togolando:** Materialojn urĝe bezonas la organizantoj de “Studgrupo Esperanta kaj Matematika”, kiu funkcias dum la lerneja jaro en la liceo Gbenyedzikope en Lomé. Partoprenas tuta klaso el tiu lernejo kaj

unuopuloj el aliaj, entute pli ol 50 personoj. Ili bezonas kajerojn, skribilojn, ekzemplerojn de la francalingva *Junulkurso*, vortarojn, kaj francalingvajn aŭ Esperantajn lernolibrojn pri matematiko. Skribu al Gbeglo Koffi (“SEM”), BP 13169 Lomé, Togo.



● **Madagaskaro:** Du svisaj gastoj ricevis tre bonan impreson pri la vigla junulara klubo “Fiestama” en Antananarivo (*foto*), kiam ili pasigis aŭgustan semajnon tie en la Nacia Centro por la Instruado de Esperanto. Korespond- kaj helpemuloj skribu al Fiestama, BP 3171, 101 Antananarivo, RDM-Madagaskaro, kaj ankaŭ al ges-roj Bérout, Müllheimerstr. 55, CH-4057 Basel, Svislando. Eblas i.a. aĉeti de ili kasedojn de dulingvaj kantoj, kontraŭ po 15 svisaj frankoj.

Persone

● **Daŝgupto:** En la unuaj monatoj de 1989, Bharata lingvoteoriisto Probal Daŝgupto transloĝiĝos el Pune al la Centro por Aplika Lingvistiko kaj Tradukologio en la Universitato de Hyderabad. La universitato nomis lin al la posteno de Profesoro pri Aplika Lingvistiko, kio ne surprizos tiujn movadanojn kiuj legis aŭ aŭdis liajn ideostimulajn prelegojn pri Esperanto kaj la moderna lingvoscienco.

● **Pérez de Cuellar:** Responde al kritiko pri sia intervjuo en la magazino de Alitalia (*Esperanto* 1988/p. 60), la ĝenerala sekretario de UN klarigis al la prezidanto de UEA ke li nur pridubis “la eblon enkonduki Esperanton kiel laborlingvon ĉe UN”. Lia komento, ke li “ne plu vidas Esperanton kiel solvon”, do ne rilatis al la ĝenerala uzo de la lingvo tra la mondo. D-ro Tonkin komentis, ke la okazaĵo ĉiukaze konfirmis la nesufiĉon de la informado ĉe UN.

● **Polgar:** La Monda Ŝak-Olimpiado en Greklando fine de novembro alportis eksterordinaran sukceson al la tri hungaraj fratinoj-esperantistoj Polgar – Zsuzsa (19), Szofia (17) kaj Judith (13). Ili konsistigis plejparton de la hungara virina teamo, kiu lastronde sukcesis venki Sovetunion por la ora medalo. Judith estis la elstara ludanto de la turneo: el dek tri partioj, ŝi gajnis dek du kaj egalludis en la cetera.

● **Sakaguchi:** La 29-an de oktobro 1988, d-ino Alicja Sakaguchi prelegis kadre de la Jarkunveno de la Semiotika Asocio por Ameriko (en Cincinnati, Usono) pri la distingo de “internacia planita lingvo” disde “etna lingvo”. La prelego aperos anglalingve en la kongres-aktoj, kiujn eldonos la Universitato de Cincinnati.

Fake

● **Ekologio:** Aperas serio de 13 artikoloj pri “Homo kaj vivmedio”, verkita de Ždeněk Pluhař, en la ĉeĥa revuo *Sano*; kunestas kompreneble multaj aliaj informoj kaj artikoloj el la medicina mondo. Petu provexemplerojn ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1.

● **Komunismo:** En septembro 1988 okazis la kvina konferenco de Kolektivo Esperantista Komunista, en Vordernberg, Aŭstrio. Venis partoprenantoj el ok landoj. Krom diskuti internajn organizajn demandojn, oni alprenis rezolucion kontraŭ la politiko de la rumana registaro rilate la hungaran minoritaton. Fondiĝis franca KEK-sekcio; oni strebas plibonigi rilatojn kun MEM kaj SAT. En novan estraron iris Ljuben Grozdanov (Bulgario, prezidanto), Paolo Cerretini (Italio, vicprezidanto), k.a. La sekva KEK-konferenco okazos en Ruse, Bulgario, en 1989. Informoj ĉe Franz Schick, Erzstr. 11, A-8704 Leoben, Aŭstrio.

● **Kulturo:** La 7-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto, okazintaj en oktobro 1988 en Poznań, Pollando, allogis altnivelajn prezentojn. Krom la eroj honore al la Jaro de Grabowski – *Sinjoro Tadeo*, *La neĝa blovado* k.a. – oni povis spekti pupteatron (premiitan en la samjara PIF), originalajn kaj tradukitajn monodramojn de profesiaj geaktoroj, klasikajn kaj kabaredajn teatraĵojn, operkantojn ktp. Estis ankaŭ riĉa kolekto de Esperantaj vidbendoj el deko da landoj, ekspozicioj kaj deklamkonkurso. La 8-a ARKONES okazos samurbe en oktobro 1989.

● **Scienca aplikado:** Prelegojn kaj partoprenantojn por la venonta AEST-seminario (Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) serĉas Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La seminario okazos en julio 1989 en Strážnice, sub la temo “Trafiko” (la jaron markas i.a. la centkvindekjariĝo de la ĉeĥaj fervojoj). Skribu al ĈEA, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1.

● **Cseh:** Internacia Esperanto-Instituto pretigis serion de ses vidbendoj pri la Cseh-metodo, kiun rajtas aĉeti nur "landaj aŭ internaciaj pedagogiaj instancoj, kiuj okupiĝas pri edukado de E-instruistoj". La kompleto kostas 1200 gld. IEI, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

● **Esperantovihkot:** Esperanto-Asocio de Finnlando lastatempe lanĉis serion de "Esperanto-kajeroj", kiu funkcios kiel finnlingva ekvivalento de "Esperanto-dokumentoj" ĉe UEA. (Tiu aperas en Esperanto, la franca kaj la angla, kaj kostas po 3,00 gld.; listo haveblas de la Centra Oficejo.) La unua ero en la finna serio, kiu celas dumonatan aperritmon, estas traduko de la brila eseo "Psikologiaj reagoj al Esperanto" de Claude Piron (ED 26E). La serio aboneblas ĉe EAF, Pengerkatu 18 A 86, SF-00500 Helsinki, pĝk 230 82-5, kontraŭ 45 finnaj markoj por ses numeroj.

● **Kanzonoj:** Jacques Manceau tradukis el la franca kaj aliaj lingvoj kvindek da "mielaj kaj pikaj kanzonoj", kaj eldonis ilin en libreto tro malmultekzemplera por esti vendata de la UEA-Libroservo. Kantemuloj povas mendi rekte de li ĉe 4 rue des Chênes, Fontcouverte, F-17100 Saintes, Francio, kontraŭ 8,40 gld. (al UEA-konto manc-d) aŭ 24,20 FF (al pĉk. 369.92U Strasbourg).

● **Lapenna:** Grupo de esperantistoj-admirantoj de la forpasinta eksprezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, kompilis sian propran omaĝon al tiu granda esperantisto. *Memore al Ivo Lapenna* (Eldonejo Perspektivo, Danlando) enhavas leterojn de kvardeko da movadanoj, kiuj servas ne nur kiel omaĝo sed kiel kvazaŭ-recenzo de la nekrologa numero de *Esperanto* en februaro 1988. Interesatoj povas peti ekzempleron ĉe la redaktinto Peter Zacho, Nørregårdvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando.

● **Monato:** Dum ĉe paĝo 4 de la septembra numero leganto protestas kontraŭ "la kreskanta nombro de tekstoj, kiuj traktas temojn el la

Esperanto-movado", ĉe paĝoj 21-23 la konata novaĵrevuo aperigas veran atuton: intervjuo de la famiganta franca lingvisto Claude Hagege fare de hungara esperantisto István Ertl. Hagege skeptikas pri Esperanto pro sia forte naturalisma sinteno, kaj tio igis la interparolon aparte interesa. Malgraŭe (aŭ eĉ graŭe, pro ĵaluzo) ni mem emas aliĝi al la citita plendo.

● **Sonkasedoj:** La estraro de la firmao "LINGVO-studio, Budapest" pretas subvencii la eldonadon de sonkasedoj en Esperanto kaj disponigi sian teknikan aparataron, pere de aparta Esperanto-fako. LINGVO-studio, pk. 87, H-1675 Budapest, Hungario.

● **Turismo:** Aperis broŝureto "Esperanto-kampadistara agado" ĉe Monda Turismo, enhavanta priskribon de kampado en Eŭropo kaj deklingvan terminareton. La lingvaĵo estas ofte erara (nenio nova ĉe la turisma fronto!), sed la informoj tamen estas utiligeblaj. Mendu ĉe Pieter van Duijne, Pk. 265, NL-4330 AG Middelburg, Nederlando, kontraŭ 3 irk aŭ 2,50 gld. al pĉk. 643460, kun indiko "broŝuro KA1".

Laste aperis...

Abismo/Abyssos. Ĵano Lajpo kaj Rikardo Ŝulco (Hans Leip kaj Richard Schulz). Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1988. 78 p. 20 x 20 cm. Ilus. ISBN 3-922570-51-8. Dudek kvar litografoj de populara germana aŭtoro, kun akompanaj sonetoj kaj enkonduka eseo dulingvaj de Ŝulco: "hororaj vizioj" pri la mondo. 18,30 gld.

Aglutinaj lingvoj kaj Esperanto, André Cherpillod (1930-). Montmirail: la aŭtoro, 1988 (loko neindikita). 24 p. 21 cm. ISBN 2-906134-06-6. Simpla, klara tipologia prezento, kun multaj ekzemploj. 5,10 gld.

Akademaj studoj 1987. Red. Rüdiger Eichholz (1922-). Bailieboro: Esperanto Press, 1988. 156 + 204 p. 29 cm. Lingvaj studoj kaj opinioj de dudeko da esperantistoj (ne nur akademi-anoj). La duan duonon konsistigas terminologia reformprojekto de Manuel Halvelik, "Terminfarada ŝlosilo" (1987). 32,10 gld.

Aldono to English Phrases and Expressions in Esperanto. F.M. Woolf. Kaburbo: la aŭtoro, 1988 (loko kaj eldonejo neindikita). 52 p. 21 cm. Kompletigo al la konata tradukilo por anglaj idiomaĵoj. 7,50 gld.

Aleo aŭtuna. Lidia Ligeza. Krakovo: la aŭtoro, 1987. 32 p. 20 cm. ISBN 83-85033-02-5. Lirikaj liberversaĵoj, trafe pri-skribaj pri la ĉiutaga vivo. 4,50 gld.

Avineto Luno. Lin Songjing. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 20 p. 21 cm. Kolorilus. de Ĝang Ĝjiping. Du rakontetoj por infanoj. 3,00 gld.

de moseo al andersen. Red. ludovikito. Nagojo: Eldonejo Ludovikito, 1988. 502 p. 21 cm. Iam kompletigota plena verkaro de zamenhof, parto dua (tradukaĵoj), volumo 4. Represoj el *La revuo*, aprilo 1910-julio 1914 (el *La biblio*, *La rabeno de Baĥaraĥ* kaj *Fluganta kofro*). 48,00 gld.

Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ. Adriaan Roland Holst (1888-1976), el la nederlanda trad. Christian Declerck. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 52 p. 21 cm. Serio "Stafeto" n-ro 8. ISBN 90-71205-24-X. Rerakonto de kelta legendo, kies ĉefrolanto estas "kvazaŭ ekzilito sur la teron". 10,80 gld.

Esperantoon suhtautumisen psykologiaa. Claude Piron, el Esperanto trad. Osmo Buller. Helsinko: Esperanto-Asocio de Finnlando, 1988. 16 p. 21 cm. Esperantovihkot, n-ro 1. Finnlingva versio de "Psikologiaj reagoj al Esperanto" (Esperanto-dokumento 26E). 4,20 gld.

Gaja mondo. Zofia Mirska. La aŭtoro, Pollando 1987. 16 p. 21 cm. Mimeo. Ilus. Poemetoj por infanoj. 2,70 gld.

Konstruado en alto. La. Otokar Březina (1868-1929), el la ĉeĥa trad. Theodor Kilian (1894-1978). Třebíč, 1982. 12 p. 21 cm. Eseto de granda poeto, pri la signifo de homa kreado kaj laboro. 4,50 gld.

Konvero. Jindřich Novák kaj Ivan Špička. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1987. 32 p. 20 cm. Ilus. Faklibreto pri ĵudotekniko. 4,80 gld.

Lingvoj en Eŭropo. Statistikoj kaj iomete pli. Kompilis Uwe Joachim Moritz. Eschweiler: Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, 1988. 36 p. 21 cm. Mapo. Klarigo de la "etnismo" filozofio pri la rajtoj de minoritataj lingvoj. 4,50 gld.

Nepivaj vortoj. André Cherpillod (1930-). Montmirail: la aŭtoro, 1988 (loko neindikita). 180 p. 21 cm. ISBN 2-906134-05-8. "Listo de 6800 vortoj ne troviĝantaj en la PIV, el kiuj kelkaj povus esti utilaj." Kun font- kaj etimologiaj indikoj. 24,80 gld.

Kongresa Komunikilo



74-a UNIVERSALA KONGRESO

DE ESPERANTO, Brajtono (Brighton), Anglio,
29 julio-5 aŭgusto 1989

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Esperanto-Asocio de Britujo,
140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britio

Loka Kongresa Komitato: Estas elektita nova membro de LKK, s-ro Eric McCanlis el Londono, taskita pri antaŭkongreso kaj londona lanĉo. LKK-membro Sally Philips okupiĝos, kune kun Edward Griffiths, pri lokaj kontaktoj.

Kongresa temo: Oni decidis elekti la temon "Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado". La temo estos pri-traktita plurmaniere kaj plurfacete, kiel kutime en UK-oj.

Kotizoj: Kotizoj por la dua aliĝperiodo estas: individua membro de UEA 188 gld., nemembro 225 gld., kunulo/junulo/handikapulo (mem IM de UEA) 112 gld., kunulo/junulo/handikapulo (nemembro) 150 gld. La tarifo por ĉiuj netranspagipovaj landoj kaj ĉiuj landoj de Afriko, Latina Ameriko kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko) estas duona. La limdato estas la 31-a de marto 1989. *Grave!* La dato de aliĝo estas la dato de ricevo de la pago. Surlokaj pagontaj devos pagi la plej altajn respektivajn kotizojn, senkonsidere pri la dato de sendo de la aliĝilo.

Londona lanĉejo: la eleganta Guildhall

Postmilita japana antologio. Komp. Odagiri Hideo, Miyamoto Masao kaj Konisi Gaku. Osako: Japana Esperanta Libro-kooperativo, 1988. 320 p. 22 cm. Bind. Noveloj (kaj unu dramo) de 12 aŭtoroj, spegulantaj la disvolviĝon de la japana popolo post 1945. 51,60 gld.

Qu Yuan. Historia dramo en kvin aktoj. Guo Moruo (1892-1978), el la ĉina trad. Laŭlum. Pekino: Ĉina Ĝesperanto-Eldonejo, 1987. 120 p. 22 cm. Fotoj. Bind. Dramo el la jaroj de la ĉina revolucio, kiu trovis en la 4-a jarcento a.K. aktualan mesaĝon. 4,20 gld.

Ridinda flanko de l' mondo. Komp. Djuro Janĉi, trad. Josip Pleadin. Djurdjevac: la kompilintoj, 1988. 32 p. 19 cm. Ilus. Ĝercoj kaj aforismoj. 6,00 gld.

Spirita vivo, La. Div. aŭtoroj, red. Philippe Cousson. Poitiers: la redaktinto, 1988. 68 p. 21 cm. Evangeliaj kajeroj, n-ro 3. Eseoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj. 12,00 gld.

Turystyczny słowniczek polsko-esperancki. Regina kaj Andrzej Grzębowski. Bydgoszcz: Centralny ośrodek informacji turystycznej oddział w Bydgoszczy, 1986. 52 p. 15 cm. Turisma ŝlosilo. 3,00 gld.


Urbi et orbi. Karolo Piĉ (1920-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1988. 18 p. 21 cm. "Repliko al Valerio Ari (t.e. Giorgio Silfer)": defendo de la aŭtoraj principoj pri literatura vortkreado. 8,40 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Aliĝo: Loĝantaj en Britio sendu kotizojn al la adreso de LKK. Aliaj sendu nepre al la konstanta kongresa adreso. Aliĝilojn sen pago oni ne traktos. Kongresanoj el landoj kun transpagaj problemoj prefere aliĝu pere de siaj landaj asocioj/kongresaj perantoj. Tiel oni povos uzi la plej konvenajn aliĝperiodojn kaj solvi la transpagajn problemojn (estos provizita komforta malmultekosta loĝejo ne tro for de la kongresejo). Aliaj sendu la kongresan kotizon al la konstanta adreso en Roterdamo.

Invitleteroj kaj aliaj servoj: Oficialan invitleteron oni sendos nur al plene aliĝintaj kaj pagintaj kongresanoj. La kongresa administracio ankaŭ ne peras al provizoraj aliĝintoj loĝadon kaj aliajn aranĝojn. Principe, oni ne planas prizorgi loĝadon por la surlokaj aliĝintoj.

Kongresejo: La kongresejo estas "Brajtona Centro", unu el la plej famaj kaj imponaj konferencejoj en Britio. Ĝi disponas pri granda salono por pli ol 2500 homoj, kaj pri ĉiuj aliaj bezonaĵoj por esti bona UK-kongresejo.



Kvakera Domo: La Kvakera Domo en Brajtono estos malfermita dum la kongresa semajno kaj estos, principe kaj laŭaranĝe, je dispono de la kongresanoj. Informoj ĉe Martin Howard, sekretario de Kvakera E-Asocio, Webb's Cottage, Woolpits Road, Great Saling, Braintree CM7 5DX, Britio.

Programo: Krom la kutimaj programeroj oni povos ĝui modernajn britajn dramojn en Esperanto, kaj interesajn muzikajn prezentojn. En la kleriga parto okazos prelegoj pri Britio kaj ties lingvoj (ĉefe la angla kaj kimra).

Ekskursoj: Krom naŭ tuttagaj ekskursoj, okazos kvar duontagaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon kaj plurfoja rondveturo tra Brajtono.

Dua Bulteno: La Dua Bulteno, kun mendiloj por ĉiuj aranĝoj, estas dissendota en januaro. Mendintoj prefere mendu frue por havi pli grandajn elekt-eblecojn.

Antaŭkongreso: La kotizo por partopreni nur la solenaĵon en la Guildhall estas 80 gld.; kun loĝado en studenta domo (du noktoj kun matenmanĝoj), 200 gld.; kun loĝado en bonaj hoteloj, inter 500 kaj 740 gld. Aldona prezo por aŭtobusa ekskurso tra centra Londono, 25 gld. Oni povas mendi ankaŭ la postan vojaĝon al Brajtono.

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.00-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27 (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

11.00-00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525kHz).

11.00-11.30 Pekino, 43.13m (6955 kHz), 31.64m (9480 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.75m (11650 kHz), 19.50m (15385 kHz).

15.30-15.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.30-23.00 Pekino, 30.42m (9860 kHz), 26.05m (11515 kHz).

LUNDE

13.30-13.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

MERKREDE

01.15-01.25 Berno, 49.22m (6095 kHz), 48.90m (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

03.15-03.25 Berno, 48.90m (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

07.45-07.55 Berno, 31.38m (9560 kHz), 21.92m (13685 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.83m (21695 kHz).

10.45-10.55 Berno, 25.14m (11935 kHz),

22.00m (13635 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz).

13.15-13.25 Berno, 25.65m (11695 kHz), 22.00m (13635 kHz), 19.82m (15135 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.83m (21695 kHz).

15.15-15.25 Berno, 21.92m (13685 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.87m (21630 kHz).

17.15-17.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 19.44m (15430 kHz), 19.32m (15525 kHz), 16.83m (17830 kHz).

22.15-22.25 Berno, 50.29m (5965 kHz), 30.58m (9810 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

ĴAŬDE

06.00-06.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz). Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

13.30-13.40 Berno, kiel lunde.

21.25-21.35 Tallinn, 290m (1035 kHz), 50.63m (5925 kHz). Nur la unuan kaj trian ĵaŭdojn de la monato. Eesti Raadio, Esperanto-fako, SU-200100 Tallinn, Estonio, Sovetunio.

SABATE

13.30-13.40 Berno, kiel lunde.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.

Berno, kiel merkrede.

DIMANĈE

08.00-08.20 Havano, 31.50m (9525 kHz). Radio Habana Cuba, Esperanto-sekcio, Apartado 70-26, La Habana, Cuba.

09.30-09.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 21.85m (13730 kHz), 19.47m (15410 kHz).

O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

09.50-10.00 Budapeŝto, M.F. 67.05 Mhz, 67.97 MHz, 68.24 MHz, 68.36 MHz, 68.48 MHz, 68.72 MHz, 69.38 MHz, 70.10 MHz, 70.43 MHz, 70.64 MHz, 72.08 MHz. Programo preparita de Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

09.20-09.30 Tallinn, kiel la antaŭa ĵaŭdo. **17.00-17.20 Havano**, 31.41m (9550 kHz), 25.59m (11725 kHz), 25.51m (11760 kHz), 25.26m (11875 kHz), 19.70m (15230 kHz), 19.56m (15340 kHz).

20.00-20.10 Vatikano, 570m (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj MF 93.3 MHz, 96.3 MHz, 105.0 MHz (ankaŭ je festotagoj).

20.30-20.55 Vieno, 50.46m (5945 kHz), 48.74m (6155 kHz), 21.85m (13730 kHz).

22.00-22.20 Havano, 25.10m (11950 kHz), 19.80m (15155 kHz).

22.40-23.00 Havano, 49.50m (6060 kHz), 25.43m (11795 kHz), 25.38m (11820 kHz), 25.06m (11970 kHz).

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

DIREKTITAJ ONDOJ

Berno: je la 01.15h al Centra Ameriko kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.15 al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45h kaj 10.45h al Malproksima Oriento; je la 13.15h al Proksima Oriento kaj Azio; je la 15.15h al Proksima Oriento; je la 17.15h al Arabio kaj Afriko; je la 22.15h al Suda Ameriko. **Havano**: je la 22.00h al Eŭropo, Afriko kaj Proksima Oriento. **Pekino**: je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.30h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 1530, 9625, 11700 kaj 15120 kHz je la 20.00h al Afriko. **Vieno**: 13730 kHz je la 20.30h al Suda Afriko, 15410 kHz al Proksima Oriento.

SEZONA HORŜANĜO

Ekde la 26-a de marto 1989 la elsendoj el Berno (nur la eŭropa programo je 13.30h), Budapeŝto, Tallinn, Vatikano, Zagrebo estos aŭskulteblaj horon pli frue laŭ UTC.

ALIAJ STACIOJ

(regiona aŭdebleco; horoj laŭ loka tempo) **Brazilo**: Sorocaba (ZYK669), 1080 kHz, vendrede, 21.00-22.00h; **Rio de Janeiro** (ZYJ462), 1400 kHz, dimanĉe, 19.30-19.45h (Brazila Spiritisma Federacio).

ESPERANTLINGVAJ ELSENDOJ DUM LA JARO 1988

				Nombro	Daŭro
Aŭstrio	Wien	(15 × 2 =)	30 min/sem (ĝis apr)	17	8.30
		(25 × 2 =)	50 min/sem (de majo)	35	29.
Brazilo	Rio de Janeiro		15 min/sem	52	13.
			60 min/sem	52	52.
Ĉinio	Beijing	(30 × 4 =)	120 min/tage	1464	732.
Hungario	Budapest		10 min/sem	52	8.40
Italio	Roma		20 min/sem	52	17.20
Jugoslavio	Zagreb		15 min/sem	52	13.
Pollando	Warszawa	(25 × 4 + 30 × 2 =)	160 min/tag (ĝis apr)	726	322.40
		(25 × 4 + 60 × 1 =)	160 min/tag (de majo)	1225	653.20
Sovetunio	Tallinn	(10 × 2 =)	20 min/½ mon	48	8.
Svislando	Bern	(10 × 19 =)	190 min/sem	988	164.40
Vatikano	Radiovaticana	(10 + 15)	25 min/sem	104	21.40

Entute por la jaro 1988: **4919** elsendoj per **11** stacioj dum **2044** horoj.

Korespondemuloj: Sendu vian anonceton por senpaga enpresigo en *Korespondi*. Eldonanto R. Melo, 34, Av. Russie, F-03700 Bellerive, Francio. Specimenon kontraŭ 2 irk.

Ekfunkciis en Hungario informobanko pri la nun funkciaj surpodiaj artistoj laŭ la varsovia komisio de la Komitato de UEA. La informobanko havas detalan informon pri pli ol dek grupoj aŭ personoj, kiuj artnivele povas sin prezenti surpodie. Petu informon de la Centra Oficejo de HEA. La adreso: Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario.

Perdintoj: Se vi perdis aŭ postlasis objekton ĉe la 73-a UK (ekzemple Hanimex-kovrilon), petu resendon de la Centra Oficejo kontraŭ afranko-kostoj.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bv. vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Mi aĉetas **Esperanto literature** (1930) de Sturmer kaj la romaneton **La mondon al ni!** (1934) de Kilian. Osmo Buller, PL 272, SF-90101 Oulu, Finnlando.

Infanajn korespondantojn serĉas 80 lernantoj 10- ĝis 15-jaraj de Valery Malyhin, per. Vuzovskij 16-83, SU-660025 Krasnojarsk, Sovetunio.

Servo en letero. Por esperantistoj, kiuj volas kaj povas valute aŭ per irk pagi aŭ rekompenci konvene siajn mendojn leterformajn antaŭsende, mi povas sendi diversajn etvarojn. Atentu tamen, ke al ĉiuj landoj oni ne povas certi pri la veno kaj la stato de la produktaĵoj. Mi esperas ĉenon da gesamideanoj, por ke ni mutuale helpu kaj interŝanĝu diversajn etvarojn. Servo en letero, Pentti Törmälä, Kirkkokatu 9, SF-06100 Porvoo, Finnlando.

Internacian fotoekspozicion organizas Esperanto-klubo "Kolombo de Paco". Kolorajn kaj nigrablankajn fotojn pri ĉiuj temoj, prefere 30x40 cm, sendu al Vasil Stanoviĉ, PK 20, SU-293720 Drogobic, Sovetunio, indikante titolon, nomon, profesion kaj adreson. Premiojn, inviton, katalogon povas ricevi kontribuantoj.

"Stafeto"-serio prezentas:

Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ

Adriaan Roland Holst

Mallonga romano inspirita de keltaj elementoj, kiu disvolviĝas en Irlando.

Ĝi estas perleto sur la krono de la nederlanda literaturo, majstre tradukita de Christian Declerck.

Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ. 52 paĝoj, 198 bfr./10,80 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

"Stafeto"-serio prezentas:

NIGRA MAGIO

Deck Dorval

Dum ŝtorma, pluvplena vespero aŭto paneas. Sinjorino Barnaŝ, klarvidantino, unu el la kvar pasaĝeroj eksentas la ĉirkaŭeston de malbonaj spiritoj... Jen la scenaro por enigmo solvenda de inspektoro Ksaverio Kant en tria parto de la sukcesplena detektivserio.

Nigra magio. 216 paĝoj, 522 bfr. aŭ 24,30 gld. + sendokostoj. Bindita. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

PARIZA FRENEZA SEMAJNO

Solenu la 200an datrevenon de la Franca Revolucio, 22-29 julio 1989

"La Parizanoj estas gajaj homoj" L.L.Z. (PIV)

Profitu nian frenezan semajnon kaj kontrolu la aserton de nia majstro!

Malkovru la ĉiaman kaj hodiaŭan Parizon!

Konstatu, ke **daŭre staras** la Eiffel-turo, la Kolono de la Bastilo, la Operdomoj, Katedralo Notre-Dame, la Louvre-Palaco, la Obelisko, la Panteono . . .

Miru pri la uzinaspekta Kulturcentro Pompidou, pri la Piramido ĉe la Kvadrata Korto de l' Louvre, pri la Kolonoj de Buren apud la Reĝa Palaco, pri la Civito de la Sciencoj kaj ties fama Geode (kun ĝia 1000-kvadratmetra ekran), kie vi retrovos la impresojn de viaj praprageavoj spektante filmon de Lumiere . . . ktp . . .

Sed ne nur monumentoj kaj muzeoj vidindas en Parizo: vi povos butikumi ŝike laŭ Elizeaj Kampoj kaj **popole** tra la pulbazaro de Saint Ouen.

Ankaŭ **frivole** vi spektos la mirindan revuon de la famkonata kabaredo **LATINA PARADIZO**.

5500 F*

Informilon kaj aliĝilon petu rapide de Unuiĝo Franca por Esperanto (Turisma Servo) 4 bis, rue de la Cerisaie F-75004 PARIS

Entenatas:

- luksa hotelo por sep noktoj,
- matenmanĝoj kaj ok luksaj manĝoj laŭ franca kulturo,
- aro da vizitoj al muzeoj, luksaj spektakloj, panoramoj, unikaj neofte vizitataj kvartaloj,
- esperantistaj ĉiĉeronoj kaj . . . transportoj.

* 6400 F por unupersona ĉambro

Esencaj informaj verkoj, sub la ŝildo de UEA:

LA FENOMENO ESPERANTO

William Auld

Populara prezento, celata por traduko en naciajn lingvojn. La libron komencas konciza skizo de la monda lingvo-problemo; sekvas klarigo de la fundamentaj ecoj de Esperanto mem, poste historioj de la movado kaj literaturo, kaj fine instigo uzi la lingvon por praktikaj kaj kulturaj celoj. La tuton animas la pasia amo de la aŭtoro por sia studobjekto.

120 p. 21 cm. Ilus. ISBN 92-9017-037-9. 18,00 gld.

ESPERANTO:

LINGVO – LITERATURO – MOVADO

Pierre Janton

Aŭtora traduko de tre sukcesa franclingva verko. Se *La fenomeno* aparte taŭgas por homoj kun mez- aŭ alt-lerneja edukado, tiu ĉi libro estus perfekta bazo por unuajara universitata kurso. Enestas elementa lingvistika prezento de Esperanto, sociologiaj studetoj de la literaturo kaj movado, kaj utila bibliografio.

120 p. 21 cm. ISBN 92-9017-034-4. 18,00 gld.

Mendu de la Libroservo de UEA. Por ambaŭ eldonaĵoj validas triona rabato ekde tri ekzempleroj.

KULTURAJ ARANĜOJ 1989

- *31-an de marto posttagmeze – 7-an de aprilo posttagmeze*
Internacia Renkonto de Infanoj
kursoj, redaktado de ĵurnalo, promenadoj, distraĵoj
Instrumetodo
prezento de diversaj metodoj, praktikaj konsiloj
 - *16-a de junio posttagmeze – 30-an de junio matene*
Internacia Amika Renkonto
nedevisa programo: konversacioj, komunaj promenadoj, ekskursoj, kursoj, distraj vesperoj
 - *2-an de julio posttagmeze – 17-an de julio matene*
Prelegoj kaj kursoj
serio de prelegoj okaze de la ducentjara datreveno de la Franca Revolucio, kursoj por diverslingva lernantaro, konversacioj, ekskursoj, distraj vesperoj
 - *18-an de julio posttagmeze – 31-an de julio matene*
Lernu kaj Praktiku
kursoj diversnivelaĵ, konversacioj, ekskursoj, distraĵoj
 - *1-an de aŭgusto posttagmeze – 14-an de aŭgusto matene*
Omaĝo al E. Privat / Kursoj
prelegoj pri Edmond Privat, kursoj diversnivelaĵ, konversacioj, promenadoj, ekskursoj, distraj vesperoj
 - *14-an de aŭgusto posttagmeze – 28-an de aŭgusto matene*
Somera Lernejo
kursoj diversnivelaĵ, konversacioj, promenadoj kaj ekskursoj, distraj vesperoj
- (artlaboroj: bindado de libroj, korbofarado, teksado, fotoarto, laŭ la periodoj)

Kultura Esperanto-Domo

Kastelo "Grésillon"

F-49150 BAUGÉ, Francujo



HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO.

De 68 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 19,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

(43 guldenoj; aldonaj kostoj por aera sendo)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (TO), Italio

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska